

Karlo Markso

Salajro, prezo kaj profito

Karlo Markso

Salajro, prezo kaj profito

Tradukis Vilhelmo Lutermano

Kun postparolo de la tradukinto

Monda Asembleo Socia (MAS)

Karlo Markso

Salajro, prezo kaj profito

Tradukita de Vilhelmo Lutermano

Prelego, farita dum la kunsidoj de la Ĝenerala Konsilantaro de la 1-a Internacio la 20-an kaj 27-an de junio 1865. Verkita fine de majo ĝis la 27-a de junio 1865. Unuafoje publikigita de la filino de Markso Eleanor sub la titolo "Value, price and profit" kun antaŭparolo de Edward Aveling. Laŭ la manuskripto de la prelego. El la angla.

Esperantigita (el la germana lingvo) laŭ la eldono de *Lohn, Preis und Profit, Karl Marx und Friedrich Engels: Werke Bd 16, Berlino (GDR), p. 102 - 152, en la versio de la reta publikigo de*

http://www.mlwerke.de/me/me16/me16_101.htm

kaj helpe de la franclingva versio aperinta en:

www.marxists.org/francais/marx/works/1865/06/km18650626.htm

Monda Asembleo Socia (MAS)

Eldonejo: Unesko-Grupo Narbonia, FR-11360 Embres-et-Castelmaure, 2007

ISBN 978-2-9529537-1-9

EAN 9782952953719

Enhavo

Io enkonduka	6
1. Produktado kaj salajroj	7
2. Produktado, salajro, profito	9
3. Salajroj kaj moncirkulado	17
4. Propono kaj postulo	21
5. Salajroj kaj prezoj	23
6. Valoro kaj laboro	26
7. La laborforto	34
8. La produktado de la plusvaloro	37
9. La valoro de la laboro	39
10. Profito fariĝas per vendo de varo laŭ ĝia valoro	41
11. La diversaj partoj en kiuj dividiĝas la plusvaloro	42
12. La ĝenerala rilato inter profitoj, laborsalajroj kaj prezoj	45
13. La precipaj provoj altiĝi la laborsalajron	47
14. La batalo inter kapitalo kaj laboro kaj ĝiaj rezultoj	53
<i>Postparolo de la tradukinto</i>	59

Io enkonduka

Civitanoj!

Antaŭ ol mi pritraktu nian temon, permesu al mi kelkajn antaŭrimarkojn. Aktuale regas sur nia kontinento vera epidemio da strikoj, kaj ĝenerale oni postulas salajro-altigon. La demando estos preparolata en nia kongreso. Vi kiel gvidantoj de la Internacia Asocio devas havi firman starpunkton en tiu superrega demando. Mi miavice konsideris mia devo pritrakti detale tiun aferon - eĉ se mi riskas elmeti vian paciencon al forta provo.

Plian antaŭrimarkon rilate la civitanon Weston. Li ne nur disvolvis antaŭ vi opiniojn kiuj, kiel li scias, estas ekstreme malpopularaj en la laborista klaso; li defendis tiujn opiniojn ankaŭ publike, kiel li kredas - en la intereso de la laborista klaso. Tian pruvon de morala kuraĝo ni devas ĉiuj alte estimi. Malgraŭ la senornama stilo de miaj klarigoj li ĉe la fino espereble komprenos, ke mi samopinias kun tio kio ŝajnas al mi esti la esenca penso de liaj frazoj, kiujn mi tamen en iliaj nunaj formoj ne povas alie ol konsideri teorie malĝustaj kaj praktike danĝeraj.

Mi nun aliras senhezite la aferon.

1. Produktado kaj salajroj

La argumentado de civitano Weston baziĝis esence sur du kondiĉoj:

1. ke la *sumo de la nacia produkto* estas *io senŝanĝa* aŭ, kiel dirus la matematikistoj, *konstanta* kvanto aŭ grando;

2. ke la *sumo de la reala salajro*, do de la salajro, mezurata per la kvanto da varoj aĉetebla per ĝi, estas *senŝanĝa* sumo, *konstanta* grando.

Nu, la erareco de lia unua aserto evidentas. Vi konstatos, ke valoro kaj kvanto de la produkto ĉiujare altiĝas, ke la produktivo de la nacia laboro pligrandiĝas kaj ke la monkvanto necesa por la cirkulado de tiu kreskinta produkto konstante ŝanĝiĝas. Kio validas por la fino de la jaro kaj por diversaj komparataj jaroj, tio validas ankaŭ por ĉiu mezuma tago en la jaro. La kvanto aŭ grando de la nacia produkto ŝanĝiĝas konstante. Ĝi ne estas *konstanta*, sed varia granda, kaj senkonsidere al ŝanĝiĝoj de la stato de la loĝantaro tio ne povas esti alia pro la konstanta ŝanĝiĝo en la *akumulado de la kapitalo* kaj de la *produktivo de la laboro*. Nekontesteble, se hodiaŭ okazus *altiĝo de la ĝenerala salajrokvoto*, tiam tiu altiĝo, kiuj ajn estas ĝiaj finaj sekvoj, *per si mem ne rekte* ŝanĝus la kvanton de la produkto. Ĝi unue elirus el la aktuala stato de la aferoj. Sed se la nacia produkto estis antaŭ la salaroaltiĝo *varia* kaj ne *fiksa*, ĝi estos ankaŭ *post* la salajroaltiĝo daŭre varia kaj ne fiksa.

Sed supoze ke la kvanto de la nacia produkto estus *konstanta* anstataŭ *varia*. Eĉ tiam tio, kion nia amiko Weston konsideras racia argumento, restus nura aserto. Se mi havas konkretan nombron, ekzemple 8, tiam la *absolutaj* limoj de tiu nombro tute ne malhelpas ĝiajn konsistajn partojn ŝanĝi siajn *relativajn* limojn. Se la profito valoris 6 kaj la salajro 2, la salajro povus atingi 6 kaj la profito fali al 2, kaj tamen la entuta sumo restus 8. Tiel la fiksa kvanto de la produkto tute ne pruvus ke la kvanto de la salajro estas fiksa. Sed kiel nia amiko Weston pravas tion? Simple per tio ke li asertas ĝin.

Sed eĉ se ni konsentus lian aserton, rezultiĝus el tio du aferoj, dum li vidas nur unu. Se la salajrokvanto estas konstanta granda, ĝi nek altigeblas nek

malaltigeblas. Do, se la laboristoj agas malsaĝe trudi provizoran salajro-altigon, tiam la kapitalistoj ne agas malpli malsaĝe trudante provizoran salajro-malaltigon. Nia amiko Weston ne neas, ke la laboristoj *povas* sub certaj cirkonstancoj trudi altigon de sia salajro, sed ĉar ties kvanto estas, laŭ li, nature fiksita, devas sekvi reakcio. Aliflanke li ankaŭ scias, ke la kapitalistoj *povas* trudi salajro-malaltigon kaj ke ili fakte konstante provas tion. Laŭ la principo de konstanta salajro en unu kazo kiel en la alia devus sekvi reakcio. Do se la laboristoj kontraŭstaras la provon aŭ realigon de salajro-malaltigo, ili farus tute prave. Ili do agus ĝuste, se ili trudus *salajro-altigon*, ĉar ĉia *defend-reago* kontraŭ malaltigo de la salajro estas *ago* por salajro-altigo. Laŭ la principo de civitano Weston mem de *konstanta salajro* la laboristoj en certaj cirkonstancoj do kuniĝu kaj batalu por salajro-altigo.

Se li rifuzas la konkludon, li devas forcedi la premison el kiu ĝi rezultiĝas. Anstataŭ diri ke la kvanto de salajro estas *konstanta kvanto*, li devus diri ke, kvankam ĝi nek povas nek devas *altiĝi*, ĝi tamen povas kaj devas *malaltiĝi* ekde kiam plaĉas al la kapitalo malaltiĝi ĝin. Se plaĉas al la kapitalisto manĝigi al vi terpomojn anstataŭ viando kaj avenon anstataŭ tritiko, tiam vi devas akcepti lian volon kiel leĝon de politika ekonomio kaj submeti vin al ĝi. Se en iu lando, ekz-e en Usono, la salajrokvoto estas pli alta ol en alia, ekz-e en Anglio, vi devas klarigi tiun diferencon de la salajrokvoto per diferenco en la volo de la usona kaj de la angla kapitalisto, metodo, kiu sendube ege faciligus la studadon ne nur de la ekonomiaj, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj fenomenoj.

Sed eĉ tiam estus permesate demandi, *kial* do la volo de la usona kapitalisto estas diversa de tiu de la angla. Kaj por respondi tiun demandon, vi devas iri trans la sferon de la *volo*. Pastro povas voli kredi al mi ke la volo de Dio estas en Francio io kaj en Anglio io alia. Se mi postulus ke li klarigu al mi tiun voldisecon, li povus aŭdaci respondi al mi ke estas la volo de Dio havi en Francio iun volon kaj en Anglio alian. Sed nia amiko Weston estas certe la lasta kiu konsiderus argumento tian forcedon de ĉia racia pensado.

Certe estas la *volo* de la kapitalisto preni tion kio preneblas. Por ni gravas ne fantazii pri lia *volo*, sed esplori lian potencon, la *limojn de tiu potenco* kaj la *econ de tiuj limoj*.

2. Produkto, salajro, profito

La prelego farita al ni de civitano Weston povintus trovi spacon en nuksoŝelo.

Ĉiuj liaj diroj havis jenan konkludon: Se la laborista klaso devigas la kapitalistan klason pagi 5 ŝ¹ anstataŭ 4 en formo de mona salajro, tiam la kapitalisto reage redonus en formo de varoj valoron de 4 anstataŭ 5 ŝ. La laborista klaso devus pagi tion per 5 ŝ kion ĝi antaŭ la salajroaltigo aĉetis per 4 ŝ. Sed kial tio okazas? Kial la kapitalisto redonas interŝanĝe por 5 ŝ nur valoron de 4? Ĉar la salajrokvanto estas fiksa. Sed kial ĝi estas fiksita al varovaloro de 4 ŝ? Kial ne al 3 aŭ 2 ŝ aŭ al ajna alia sumo? Se la limo de la salajrosumo estas difinita de ekonomia leĝo, kiu estas same sendependa de la volo de la kapitalisto kiel de la volo de la laboristo, tiam civitano Weston devintus unue eldiri tiun leĝon kaj pruvi ĝian ekziston. Sed tiam li devintus ankaŭ pruvi, ke la en ĉiu donita tempopunkto fakte pagita salajrosumo respondas precize al la necesa salajrosumo kaj neniam devojiĝas de ĝi. Aliflanke, se la donita limo de la salajrosumo baziĝas sur la *nura volo* de la kapitalisto aŭ sur la limoj de lia avido, ĝi estas arbitra. Ĝi estas sen ajna neceso. Ĝi ŝanĝeblas *per* la volo de la kapitalisto kaj pro tio ankaŭ *kontraŭ* lia volo.

Civitano Weston ilustris al vi tiun teorion per tio, ke, se supujo entenas certan kvanton da supo por nutri certan nombron da personoj, plilarĝiĝo de la kuleroj ne efikas pligrandiĝon de la supo-kvanto. Li devas ja permesi al mi trovi tiun ilustraĵon sufiĉe formanĝita. Ĝi memorigis al mi sufiĉe pri la parabolo kiun uzis Menenio Agripo. Kiam la romaj plebejoj ek-strikis kontraŭ la romaj patricioj, la patricio Agripo rakontis al ili, ke la patricia ventro nutras la plebejajn membrojn. Agripo ne pruvis, kiel iu provizas la membrojn de iu per plenigo de la ventro de iu alia. Civitano Weston siavice forĝesis, ke la supujo, el kiu manĝas la laboristoj, estas plenigita per la tuta produkto de la nacia laboro kaj ke, se io malhelpas la laboristojn depreni pli el la supujo, tio estas nek la mallarĝeco de la supujo nek la malabundo de ties enhavo, sed sole nur la malgrandeco de iliaj kuleroj.

1 ŝ = ŝilingo; 1 sterlinga pundo (stp) = 20 ŝilingoj = 240 pencoj (d) (ĝis 1971) -vl

Per kia artifiko la kapitalisto kapablas por 5 ŝilingoj redoni valoron de 4 ŝilingoj? Per prezaltiĝo de la varo vendata de li. Sed ĉu la altiĝo, kaj entute la ŝanĝiĝo de la varprezoj, ĉu do la varprezoj mem dependas de la nura volo de la kapitalisto? Aŭ ĉu ne necesas pli ĝuste certaj cirkonstancoj por efektiviĝi lian volon? Se ne, la supren- kaj malsupren-moviĝoj, la senĉesaj fluktuaĵoj de la merkatprezoj fariĝas nesolvebla enigmo.

Se ni supozas, ke okazis nenia ŝanĝo, nek en la produktivo de la laboro nek en la amplekso de la kapitalo kaj de la aplikata laboro, nek en la valoro de la mono en kiu la valoroj de la produktoj estas taksataj, sed *nur ŝanĝo en la salajrokvoto*, kiel tiu *salajroaltiĝo* povus influi la *varprezojn*? Ja nur per tio ke ĝi influas la ekzistantan rilaton inter la postulo de tiuj varoj kaj ilia propono.

Estas ja ĝuste, ke la laborista klaso, konsiderata kiel tutaĵo, elspezas kaj devas elspezi sian enspezon por *vivrimedoj*. Ĝenerala plialtiĝo de la salajrokvoto do kaŭzus pliiĝon de la postulo de *vivrimedoj* kaj sekve plialtiĝon de ties *merkatprezoj*. La kapitalistoj, kiuj produktas tiujn vivrimedojn, estus kompensataj por la kreskinta salajro per kreskantaj merkatprezoj. Sed kiel la aliaj kapitalistoj, kiuj *ne* produktas vivrimedojn? Kaj ne kredu ke tio estas manpleno da. Se vi konsideras, ke $\frac{2}{3}$ de la nacia produkto estas konsumata de $\frac{1}{5}$ de la loĝantaro - aŭ eĉ nur de sepono, kiel antaŭ nelonge klarigis membro de la [brita] ĉambro de deputitoj, tiam vi komprenas, kiom grava parto de la nacia produkto estas produktata en formo de luksaĵoj aŭ *interŝanĝataj* kontraŭ luksaĵoj, kaj kia amasego eĉ de la vivrimedoj devas esti malŝparata por lakajoj, ĉevaloj, katoj ktp., malŝparo, de kiu ni scias el sper-to, ke al ĝi estas, kun kreskantaj prezoj por vivrimedoj, trudataj ĉiam pli gravaj restriktioj.

Kia estus nun la stato de la kapitalistoj kiuj *ne* produktas vivrimedojn? La suferatan *falon de la profitkvoto* ŝuldatan de la ĝenerala salajroaltiĝo ili ne povus kompensi per *prezaltiĝo de siaj varoj*, ĉar la postulo de tiuj varoj ne estus kreskinta. Ilia enspezo estus malgrandigita; kaj el tiu malgrandiĝinta enspezo ili devus pagi pli por la sama kvanto da preze altiĝintaj vivrimedoj. Sed tio ankoraŭ ne estus ĉio. Ĉar ilia enspezo estus malgrandiĝinta, ili pov

us elspezi malpli por luksaĵoj, kaj tiel ilia reciproka postulo por iliaj respektivaj varoj malpliĝus. Pro tiu malpliĝo iliaj varprezoj falus. Pro tio en tiuj industribranĉoj *falus la profitkvoto*, kaj ne nur en la simpla rilato al la ĝenerala altiĝo de la salajrokvoto, sed en la kombinita rilato kun la ĝenerala salajroaltiĝo, la prezaltiĝo de la vivrimedoj kaj la prezofalo de luksaĵoj.

Kiajn sekvojn havus tiu *diferenco* en la *profitkvotoj* por la kapitaloj aplikataj en la diversaj industribranĉoj? Nu, la samajn kiuj okazas ordinaraj, kiam pro ia ajn kaŭzo la *mezuma profitkvoto* ŝanĝiĝas en la diversaj produktosferoj. Kapitalo kaj laboro defluas de la malpli profitigaj al la pli profitigaj produktobranĉoj; kaj tiu defluro daŭrus tiom longe, ĝis kiam la propono en unu branĉo de la industrio proporcie al la kreskinta postulo estus kreskinta kaj en la aliaj branĉoj proporcie al la malkreskinta postulo estus malkreskinta. *Ekde kiam tiu ŝanĝiĝo estus okazinta*, la *ĝenerala profitkvoto* en la diversaj branĉoj estus ree *ekvilibra*. Ĉar la tuta ŝanĝo origine devenintus de nura ŝanĝiĝo en la rilato de postulo kaj propono de diversaj varoj, tial kun la ĉeso de la kaŭzo ĉesus la efiko, kaj la *prezoj* revenus al sia antaŭa nivelo kaj ekvilibro. *La malpliĝo de la profitkvoto*, anstataŭ esti limigita al kelkaj industribranĉoj, sekve al la salajroaltiĝo fariĝintus ĝenerala. Laŭ nia hipotezo okazintus ŝanĝiĝo nek en la labor-produktivo nek en la entuta sumo de la produkto, *sed ja tiu donita sumo ŝanĝintus sian formon*. Pli granda parto de la produkto ekzistus en formo de vivrimedoj, aŭ, kio estas la samo, malpli granda parto estus interŝanĝita kontraŭ eksterlandaj luksaĵoj kaj konsumita en sia origina formo, aŭ, kio ree signifas la samon, pli granda parto de la enlanda produkto estus interŝanĝita por eksterlandaj vivrimedoj anstataŭ por luksaĵoj. La ĝenerala altiĝo de la salajrokvoto pro tio sekvigis post provizora perturbo en la merkatoj nur ĝeneralan malaltiĝon de la profitkvoto, sen ke la varprezoj ŝanĝiĝus por longa tempo.

Se oni volus kontraŭdiri al mi, ke en tiu argumentado mi supozis ke la tuta plusa laborsalajro elspeziĝas por vivrimedoj, mi respondas, ke mi hipotezis la plej favoran supozon por civitano Weston. Se la plusa salajro elspeziĝus por varoj kiuj antaŭe ne eniris la konsumon de la laboristoj, tiam la reala altiĝo de ilia aĉetpovo ne bezonus pruvon. Sed ĉar la altiĝo de la aĉetpovo devenas nur el altiĝo de la salajro, tial ĝi devas esti precize proporcia al la malaltiĝo de la aĉetpovo de la kapitalistoj. La *entuta postulo* de varoj pro tio

ne *altiĝus*, sed ja en la partoj de tiu postulo okazintus *reciproka ŝanĝo*. La kreska postulo je unu flanko estus kompensata de malkreska postulo aliflanke. Pro tio ke tiel la entuta postulo restus senŝanĝa, ne povus okazi ajna ŝanĝo en la merkaptoprezoj de la varoj.

Vi estas do metita antaŭ jena dilemo: Aŭ la plusa salajro estas egalparte elspeszata por ĉiuj konsumajtoj - tiam la kresko de la postulo flanke de la laborista klaso devas esti kompensata per restriktiĝo de la postulo flanke de la kapitalista klaso -, aŭ la plusa salajro estas elspeszata nur por kelkaj varoj, kies merkaptoprezoj estas provizore altigitaj. Tiam la sekventa kresko de la profitkvoto en iuj industribranĉoj kaj la postsekva malkresko de la profitkvoto en la aliaj kaŭzos ŝanĝon en la distribuado de kapitalo kaj laboro, tiom longe ĝis kiam la propono proporcie al la kreskinta postulo en unu branĉo de la industrio estus altigita kaj proporcie al la malkreska postulo en la alia estus malaltigita. En la unua hipotezo ne okazos ŝanĝo en la varprezoj. En la alia hipotezo la interŝanĝvaloroj de la varoj post kelkaj fluktuiĝoj de la merkaptoprezoj revenos al la antaŭa nivelo. En ambaŭ hipotezoj la ĝenerala altiĝo de la salajrokvoto lastinstance kondukos al nenio alia ol al ĝenerala malaltiĝo de la profitkvoto.

Por instigi vian imagivon, civitano Weston petis vin pripensi la malfacilaĵojn kiujn kaŭzus ĝenerala altiĝo de la salajroj de la anglaj kamplaboristoj de 9 al 18 ŝ. Pripensu, kriis li, la monstran altiĝon de la postulo de vivrimedoj kaj la sekvan teruran altiĝon de iliaj prezoj! Nu, vi ja scias ĉiuj, ke la mezuma salajro de la usonaj kamplaboristoj estas la duoblo de tiu de la anglaj, kvankam la prezoj de la kampkulturaj produktoj en Usono estas pli malaltaj ol en Britio, kvankam en Usono la tuta rilato inter kapitalo kaj laboro estas la sama kiel en Anglio kaj kvankam la jara sumo de la produkto en Usono estas multe pli malalta ol en Anglio. Kial do nia amiko sonigas la alarmsonorilon? Simple por deturni nin de la vera demando. Subita salajroaltiĝo de 9 al 18 ŝ estus subita altiĝo de 100 %. Nu, ni ja ne debatas pri la demando ĉu la ĝenerala salajrokvoto en Anglio subite altigeblas je 100 %. Ni havas absolute nenion por fari kun la *grando* de la altiĝo, kiu en ĉiu praktika okazo devas dependi de la donitaj cirkonstancoj kaj esti adaptita al ili. Nia tasko estas nur esplori, kiel ĝenerala altiĝo de la salajrokvoto efikas, eĉ se ĝi estas nur 1-elcenta.

Mi lasas flanke la altiĝon de 100 % inventitan de amiko Weston kaj atentigas vin pri la vera salajroaltiĝo, kiu okazis en Britio de 1849 ĝis 1859.

Vi ĉiuj konas la dekhor-leĝon, aŭ pli ĝuste la leĝon pri la dek horoj kaj duono, kiu validas ekde 1848. Tiu estis unu el la plej grandaj ekonomiaj ŝanĝoj kiuj okazis antaŭ niaj okuloj. Tio estis subita kaj kontraŭvola salajroaltiĝo ne en kelkaj lokaj negocaj branĉoj, sed en la gvidaj industribranĉoj, per kiuj Anglio dominas la mondmerkaton. Ĝi alportis salajroaltiĝon sub eksterordinare malfavoraj cirkonstancoj. D-ro Ure, profesoro Senior kaj ĉiuj ĉi aliaj ĉefaj oficialaj ekonomikaj parolantoj de la burĝaro *pruvis* - kaj mi devas diri, kun multe pli frapaj argumentoj ol amiko Weston -, ke ĝi tintigus la mortsonorilon de la angla industrio. Ili pruvis, ke ĝi ne nur kondukos al ordinara salajroaltiĝo, sed al salajroaltiĝo kaŭzita de malpliĝo de la kvanto de aplikata laboro kaj bazita sur tio. Ili asertis, ke la 12-a horo, kiun oni volis forpreni de la kapitalisto, estas ĝuste la sola horo el kiu li ĉerpas sian profiton. Ili minacis per malpliĝo de la akumulado, prezaltiĝo, perdo de la merkatoj, ŝrumpado de la produktado, de tio kaŭzata reago al la salajroj kaj fina ruino. Efektive ili deklaris la Leĝojn pri la Maksimumo de Maksimiliano Robespiero bagatelo kompare kun tio; kaj iel ili pravis. Bone, kio estis la rezulto? Plialtiĝo de la monsalajro de la fabriklaboristoj malgraŭ la mallongigo de la labortago, granda pliĝo de la nombro da dungitaj fabriklaboristoj, longdaŭra malaltiĝo de la prezoj de iliaj produktoj, mire bela evoluo de la produktiveco de ilia laboro, senprecedence progresanta ekspansio de la merkatoj por iliaj varoj. En Manĉestro, 1861² en la kongreso de la Societo por Subteno al la Scienco, mi mem aŭdis s-ron *Newman* koncedi, ke li, d-ro Ure, Senior kaj ĉiuj aliaj oficialaj korifeoj de la ekonomia scienco eraris, dum la instinkto de la popolo rezultigis prava. Mi nomas s-ron W. Newman - ne profesoron Francis Newman -, ĉar li okupas elstaran pozicion en la ekonomia scienco kiel kunlaboranto kaj eldonisto de la "*History of Prices*" de s-ro *Thomas Tookes*, de tiu brila verko, kiu esploras la historion de la prezoj de 1793 ĝis 1856. Se ĝustus la fiksa ideo de amiko Weston pri fiksa salajrosumo, fiksa sumo de produkto, fiksa grado de produktivo de la laboro, fiksa kaj konstanta volo de la kapitalistoj kaj ĉiu lia cetera fikseco kaj finiteco, tiam la malĝojaj antaŭdiroj de profesoro Senior estintus ĝustaj, kaj malpravintus Robert Owen, kiu jam 1816 deklaris ĝeneralan limigon de la laborta

2 En la manuskripto erare: 1860.

go la unua prepara tranĉo por la liberigo de la laborista klaso kaj realigis ĝin, spite al la kutima antaŭjuĝo, memriske en siaj kotonŝpinejoj en New Lanark.

Dum tiu sama periodo, en kiu okazis la enkonduko de la leĝo pri dek homoj kaj duono kaj la sekva salajroaltiĝo, okazis en Britio pro kaŭzoj, kiujn elnombri ĉi tie ne estas la taŭga loko, *ĝenerala altiĝo de la kamplaboristaj salajroj*.

Kvankam ne necesas por mia rekta celo, mi tamen, por malhelpi miskomprenojn ĉe vi, faru kelkajn antaŭrimarkojn.

Se viro ricevas unue 2 ŝ da semajna salajro kaj lia salajro altiĝas poste al 4 ŝ, tiam la *salajrokvoto* kreskis je 100 %. Esprimita kiel kresko de la *salajrokvoto* tio ŝajnas grandioza afero, kvankam la *fakta salajro*, de 4 ŝ semajne, estus daŭre mizere malalta, malsatsalajro. Do vi ne trompiĝu pro la grandioze sonantaj elcentaĵoj de la *salajrokvoto*. Ĉiam demandu: Kio estis la *origina* sumo?

Krome vi komprenas, ke, se 10 viroj ricevas po 2 ŝ semajne, 5 viroj po 5 ŝ kaj 5 viroj po 11 ŝ semajne, la 20 viroj kune ricevas semajne 100 ŝ aŭ 5 stp³. Se nun okazus, ni diru, dudekelcenta altiĝo de la *entuta sumo* de ilia semajna salajro, tio estus altiĝo de 5 al 6 stp. Se ni kalkulus la mezumon, ni povus diri, ke la *ĝenerala salajrokvoto* altiĝis je 20 %, kvankam en realo la salajro de la 10 viroj restintus senŝanĝa, tiu de la eta kvinopo nur de 5 al 6 ŝ por ĉiu viro kaj tiu de la alia kvinopo de entute 55 al 70 ŝ. Duono de la homoj tute ne estus pliboniginta sian situacion, kvarono en apenaŭ rimarkebla grado, kaj nur kvarono efektive plibonigintus ĝin. Tamen, se oni kalkulas la *mezumon*, la entuta sumo de tiuj 20 viroj altiĝintus je 20 %, kaj, konsidere al la entuta kapitalo kiu dungas ilin, kaj al la prezoj de la varoj kiujn ili produktas, tio estus precize la samo kvazaŭ ili ĉiuj partoprenintus egale en la mezuma salajroaltiĝo. Konsidere la okazon de la kamplaboro, por kiu la salajro-nivelo en la diversaj duklandoj de Anglio kaj Skotlando estas tre diversa, tiu altiĝo efikis tre malegale al ĝi.

Ankaŭ efikis en la periodo, en kiu okazis tiu salajroaltiĝo, kontraŭaj in

3 stp = sterlingo = sterlinga pundo (brita pundo). 1 stp = 20 ŝilingoj. -v1

fluoj, kiel ekz-e per la novaj impostoj kaŭzitaĵoj de la Rusa Milito, la amasa detruado de la loĝdomoj de la kamplaboristoj ktp.

Post tiom da antaŭrimarkoj mi venas nun al la konstato, ke de 1849 ĝis 1859 la mezuma kvoto de la kamplaboristaj salajroj de Britio *altiĝis je proksimume 40 %*. Mi povus doni multajn detalojn por pruvi mian aserton, sed por la nuna celo mi konsideras sufiĉa referenci la skrupulan kaj kritikan prelegon, kiun la forpasinta s-ro *John C. Morton* faris 1860 pri "*The Forces used in Agriculture*" en la londona Society of Arts. S-ro Morton citas statistikajn donitaĵojn el kvitancoj kaj aliaj aŭtentaj dokumentoj, kiujn li kolektis en 12 skotaj kaj 35 anglaj duklandoj ĉe proksimume 100 tie aktivaj farmistoj.

Laŭ la opinio de amiko Weston, kaj se oni rilatigas kun tio la samtempan altiĝon de la salajroj de la fabriklaboristoj, la prezoj de la kampkulturaj produktoj en la periodo de 1849 ĝis 1859 devintus enorme kreski. Sed kio okazis fakte? Malgraŭ la Rusa Milito kaj la sinsekvaj malfavoraj rikoltoj de 1854 ĝis 1856 la mezuma prezo de tritiko - kiu estas la plej grava kampkultura produkto de Anglio - falis je proksimume 3 stp 10 ŝ por Kvarono⁴ por la jaroj 1849 ĝis 1859. Tio signifas malpliiĝon de la tritikoprezo je pli ol 16 % en la sama tempo en kiu la salajroj de la kamplaboristoj altiĝis je mezume 40 %. Dum la sama periodo, se ni komparas ĝin je ĝia fino kun ĝia komenco, 1859 kun 1849, la oficiala paŭperismo malpliiĝis de 934.419 al 860.470, kio faras diferencon de 73.949. Mi koncedas ke tio estas tre malgranda malkresko, kiu krome perdiĝis en la sekvaj jaroj, sed tamen malkresko.

Direblas, ke sekve al la nuligo de la grenleĝoj la importo de eksterlanda greno en la periodo de 1849 ĝis 1859 pli ol duobliĝis, kompare kun la periodo de 1838 ĝis 1848. Sed kio sekvas el tio? El la starpunkto de civitano Weston oni atendus, ke tiu subita, potenca kaj konstante kreskanta postulo sur la eksterlandaj merkatoj devintus terure altigi la prezojn de la kampkulturaj produktoj, ĉar la efiko de kreskinta postulo restas la sama, ĉu ĝi venas de eksterlando aŭ de la interna lando.

4 Kvarono: por angle, kaj ankaŭ en la germana teksto, *Quarter*, do kvarono de pezmuzo. -vl

Kio okazis fakte? Kun la escepto de kelkaj jaroj de malbonaj rikoltoj la ruiniga falo de la grenprezo en tiu tuta periodo estis la konstanta temo, pri kiu oni deklamis en Francio, la usonanoj vidis sin ĉiam denove devigataj forbruligi la troan produkton, kaj se kredi s-ron Urquhart, Rusio instigis al interna milito en Usono, ĉar ĝiaj kampkulturaj eksportoj al la eŭropaj grenmerkatoj estis malgrandigitaj de la jankia konkurenco.

Reduktita al ĝia abstrakta formo, la aserto de civitano Weston rezultiĝus jene: Ĉiu altiĝo de la postulo okazas ĉiam surbaze de donita kvanto de produkto. Pro tio ĝi povas *neniam pligrandigi la proponon de la postulataj varoj*, sed *nur altiĝi iliajn monprezojn*. Sed la plej simpla observo instruas, ke kreskinta postulo en iuj okazoj ja lasas senŝanĝaj la merkaptoprezojn de la varoj, en aliaj okazoj kaŭzas provizoran kreskon de la merkaptoprezoj, akompanate de kreskinta propono kaj siavice de reduktiĝo de la prezoj *al* ilia komenca nivelo, ja en multaj okazoj eĉ *sub* tiu. Ĉu la altiĝo de la postulo devenas el kroma salajro aŭ el alia kaŭzo, tio ŝanĝas neniom ĉe la kondiĉoj de la problemo. El la starpunkto de civitano Weston la ĝenerala fenomeno estis same malfacile klarigebla kiel la fenomeno okazanta sub la esceptaj cirkonstancoj de salajroaltiĝo. Lia argumentado do neniel rilatis kun la temo kiun ni pritraktas. Ĝi estis nur la esprimiĝo de lia senhelpeco fronte al la leĝoj, laŭ kiuj kresko de postulo, anstataŭ kaŭzi finan kreskon de la merkaptoprezoj, kondukas pli ĝuste al pliiĝo de la propono.

3. Salajroj kaj moncirkulado

La duan tagon de la debato amiko Weston vestis sian malnovan aserton en novaj formoj. Li diris: Sekve al ĝenerala kresko de la monsalajroj necesas pli da cirkuladrimedoj por pagi tiun salajron. Ĉar la moncirkulado estas fiksa, kiel per tiuj fiksjaj cirkuladrimedoj pageblas la kreskintaj salajroj?

Unue montriĝis la malfacilo el la fiksa varkvanto, kiu estas rezervita al la laboristo malgraŭ ties kreskinta monsalajro; nun ĝi estas deduktita malgraŭ la fiksa varkvanto el la kreskinta monsalajro. Se vi rifuzas lian originan dogmon, tiam malaperas kompreneble la per ĝi kaŭzigitaj malfacilaĵoj.

Tamen mi pruvos, ke tiu demando de la moncirkulado havas nenion por fari kun nia temo.

En via lando la meĥanismo de la pagoj estas multe pli perfekta ol en ia ajn alia lando de Eŭropo. Danke al la grandeco kaj koncentriteco de la bank-sistemo necesas multe malpli da cirkuladrimedoj por cirkuligi la saman valorkvanton kaj por plenumi la samajn aŭ pli grandan kvanton da negocoj. Koncerne la salajron, ekz-e la angla fabriklaboristo elspezas ĝin ĉiusemajne ĉe la butikisto, kiu sendas ĝin ĉiusemajne al la bankisto, kiu siavice ĉiusemajne venigas ĝin al la fabrikisto, kiu pagas ĝin siavice ree al siaj laboristoj ktp. Kaŭze de tiu institucio la jara salajro de laboristo ekz-e de 52 stp pageblas per unu sola sovereno⁵, kiu ĉiusemajne faras la saman rondon. En Anglio tiu meĥanismo estas eĉ malpli perfekta ol en Skotlando, kaj ĝi ne estas ĉiuloke same perfekta, kaj pro tio ni trovas ekz-e ke en kelkaj kampkulturaj distriktoj kompare kun la fabrikdistriktoj necesas multe pli da cirkuladrimedoj por cirkuligi multe malpli grandan valorkvanton.

Se vi transas la Kanalon, vi trovos ke tie la *monsalajro* estas multe pli malalta ol en Anglio, sed ke ĝi estas cirkulata en Germanio, Italio, Svislando kaj Francio pere de *multe pli granda kvanto da cirkuliloj*. La sama sove

5 Sovereno: *angle* sovereign, brita ormonero entenanta 113 granojn da fajna oro (laŭ Webster's). En la sekvo ankaŭ: svr. -vl.

reno ne estas tiom rapide kaptita de la bankisto aŭ reportita al la industria kapitalisto, kaj pro tio necesas anstataŭ unu sovenero, kiu cirkuligas 52 stp jare, eble tri soveneroj, por cirkuligi jarsalajron de 25 stp. Se vi do komparas la landojn de la kontinento kun Anglio, vi tuj vidos, ke malalta monsalajro povas necesigi multe pli da cirkuladrimedoj por sia rondiro ol alta monsalajro kaj ke tio estas envere pure teĥnika afero, kiu estas tute for de nia temo.

Laŭ la plej precizaj kalkuloj kiujn mi konas, la jara enspezo de la laborista klaso de tiu ĉi lando estas taksebla eble je 250 milionoj da stp. Tiu giganta sumo estas cirkuligata per proksimume 3 milionoj da stp. Supozate ke okazas salajrokresko de 50 %. Tiam necesus anstataŭ 3 milionoj da stp da cirkuladrimedoj 4,5 milionoj da stp. Ĉar gravega parto de la ĉiutagaj elspezoj de laboristoj estas farataj per arĝentaj aŭ kupraj moneroj, do per nuraj valorsignoj, kies valorrilato al oro estas konvencie difinita per leĝo, same kiel tiu de papermono ne interŝanĝebla kontraŭ oro, kvindek-elcenta kresko de la monsalajro en la plej malbona kazo necesigus kroman cirkuladon de soveneroj je sumo de, ekz-e, unu miliono. Unu miliono, kiu nun kuŝas en formo de ingotoj aŭ de stampita oro en la keloj de la Banko de Anglio aŭ de privataj bankoj, estus cirkuligota. Sed eĉ la malgravaj elspezoj kaŭzataj de kroma stampado aŭ de kroma eluzo de tiu miliono ŝpareblus kaj estus efektive ŝparataj, se pro kroma postulo de cirkuladrimedoj okazus iaj frotiĝoj. Vi ĉiuj scias ke la cirkuladrimedoj de tiu ĉi landoj ekzistas en du partoj. Unu speco, liverata en bankbiletoj de diversa nominala valoro, servas en la spezoj inter komercistoj kaj ĉe pli grandaj pagoj de konsumantoj al komercistoj, dum en la pomalgranda komerco cirkulas alia speco de cirkuliloj, la metalmono. Kvankam malsamaj, ĉiu de ambaŭ specoj de cirkuladrimedoj reprezentas la alian. Tiel, ormoneroj cirkulas je gravega sumo eĉ ĉe pli grandaj pagoj, kiam temas, ĉe la pagendaj sumoj, pri kromaĵoj sub 5 stp, sed pri rondaj sumoj. Se morgaŭ eldoniĝus bankbiletoj de 4 aŭ 3 aŭ 2 stp, tiuj ormoneroj kiuj plenigas tiujn cirkulad-kanalojn, estus tuj forpuŝitaj el ili kaj fluus en tiujn kanalojn, kie ili estus bezonataj pro la pliiĝo de la monsalajro. Tiel la kroma miliono, necesa pro kvindek-elcenta salajroaltiĝo, estus liverita sen ke necesus aldoni eĉ unu solan soveneron. La sama efiko produktus sen unu sola kroma bankbileto pere de kreskanta cirkulado de kambioj, kiel okazis en Lancashire dum tre longa tempo.

Se ĝenerala kresko de la salajrokvoto - ekz-e de 100 %, kiel civitano Weston supozis ĉe la salajroj de kamplaboristoj - kaŭzus grandan kreskon de la prezoj por vivrimedoj kaj - laŭ lia opinio - necesigus ne livereblan kvanton da kromaj cirkuladrimedoj, tiam *ĝenerala malkresko de la salajro* devus kaŭzi la saman efikon samproporcie en kontraŭa direkto. Bone! Vi ĉiuj sci- as, ke la jaroj 1858 ĝis 1860 estis la plej prosperigaj por la kotonindustrio kaj ke nome la jaro 1860 tiurilate unikas en la analoj de la metio, dum sam- tempe ankaŭ ĉiuj ceteraj industribranĉoj spertis altan prosperon. La salajroj de la kotonlaboristoj kaj de ĉiuj aliaj laboristoj ligitaj kun ilia komerca bran- ĉo estis 1860 pli altaj ol iam ajn antaŭe. Venis la usona krizo, kaj ĉiuj ĉi sa- lajroj estis subite reduktitaj al proksimume kvarono de la antaŭa nivelo. En alia direkto tio estintus kresko al 400 %. Se la salajro kreskas de 5 al 20, ni diras, ke ĝi kreskis je 300 %; se ĝi falas de 20 al 5, ni diras, ke ĝi falis je 75 %; sed la sumo, je kiu ĝi kreskas en unu kazo kaj en la alia falas, estus la sa- ma, nome 15 ŝ. Tio estis subita, senprecedenca ŝanĝo en la salajrokvoto, kiu suferigis samtempe nombbron da laboristoj, kiu estis duoble pli alta ol la nombro da kamplaboristoj, se oni enkalkulas ne nur ĉiujn rekte en la koton- industrio dungitajn, sed ankaŭ malrekte de ĝi dependajn laboristojn. Ĉu la tritikoprezo nun falis? Ĝi *kreskis* de jara mezumo de po 47 ŝ 8d por Kvarono dum la tri jaroj 1858-1860 al jara mezumo de po 55 ŝ 10d por Kvarono dum la tri jaroj 1961 ĝis 1863. Koncerne la cirkuladrimedojn, la stampejo stampis en 1861 8.673.232 sterlingajn pundojn kontraŭ 3.378.192 stp en la jaro 1860. Tio signifas, ke 1861 oni stampis en la valoro de 5.295.130 stp pli da moner- ojn ol 1860. Tamen, 1861 estis je 1.319.000 stp malpli da bankbiletoj en cirku- lado ol en 1860. Dekalkulu tion. Restas por la jaro 1861 kompare kun la pro- spera jaro 1860 tamen kromaĵo de cirkuladrimedoj en la valoro de 3.976.130 stp aŭ proksimume 4 milionoj da stp; sed la orprovizo de la Banko de Ang- lio samtempe malpliigis, se ne precize, tamen proksimume samproporcie.

Komparu la jaron 1862 kun 1842. Aparte la gigantan pliiĝon je valoro kaj kvanto de la cirkuligitaj varoj, la kapitalo sole en 1862 enpagita je regulaj kondiĉoj en akciojn, pruntaĵojn ktp. por la fervojoj en Anglio kaj Kimrio su- miĝis je 320 milionoj da stp, sumo kiu aspektintus mirrakonta en 1842. Ta- men la sumaj kvantoj de la cirkulanta mono en 1862 kaj 1842 estis proksi- mume samaj; kaj ĝenerale vi trovos, ke fronte al enorma valoraltiĝo ne nur

de varoj, sed ĝenerale de ĉiuj monspezoj la cirkulanta mono tendencas pli kaj pli malpliĝi. El la starpunkto de amiko Weston tio estas nesolvebla enigmo.

Se li penetrintus iomete pli profunden en la aferon, li trovintus, ke - tute aparte de la salajro kaj supozante ĝin fiksa - valoro kaj kvanto de cirkuligendaj varoj, kaj ĝenerale la sumo de la monspezoj fluktuas ĉiutage; ke la kvanto de eldonitaj bankbiletoj ĉiutage fluktuas; ke la sumo de pagoj, kiu sen interveno de mono plenumatas pere de kambioj, ĉekoj, librotenaj kreditoj, diskontaj bankoj, ĉiutage fluktuas; ke la rilato inter cirkulantaj moneroj unuflanke kaj aliflanke la moneroj kaj igotoj tenataj en rezervo aŭ kuŝantaj en la keloj de la bankoj, ĉiutage fluktuas; ke la kvanto de la nestampita nobla metalo absorbata de la nacia cirkulado, kaj la kvanto sendata eksterlanden por la internacia cirkulado, ĉiutage fluktuas. Li trovintus, ke lia dogmo pri la fiksj cirkuladrimedoj estas monstra eraro, malkongrua kun la ĉiutaga moviĝo. Li esplorintus la leĝojn kiuj ebligas ke la moncirkulado adaptiĝas al cirkonstancoj, kiuj tiel seninterrompe ŝanĝiĝas, anstataŭ ŝanĝi sian miskomprenon pri la leĝoj de moncirkulado en argumenton kontraŭ salajroaltiĝo.

4. Propono kaj postulo

Nia amiko Weston tenas sin je la latina proverbo ke "repetitio est mater studiorum", do ke la ripetado estas la patrino de studado, kaj laŭ tio li ripet- as sian originan dogmon en nova formo, ke la ŝrumpiĝo de la moncirkulado, kiu laŭ li rezultiĝas el salajroaltigo, kaŭzus malpliigo de la kapitalo, ktp. Post refuto de lia maroto pri moncirkulado mi konsideras tute senutile noti la imagitajn sekvojn, kiuj laŭ lia imago estiĝas el liaj imagaj cirkuladaj mis- oĵoj. Mi volas nun redukti lian *dogmon*, kiu estas *ĉiam la sama*, en kiom ajn formoj ĝi estas ripetata, *al ĝia plej simpla teoria esprimo*.

La senkritika maniero, en kiu li pritraktas sian temon, evidentiĝas el unu sola rimarko. Li pledas kontraŭ salajroaltigo aŭ kontraŭ alta salajro kiel re- zultado de tia altigo. Nun mi demandas lin: Kio estas alta kaj kio estas malalta salajro? Kial ekz-e 5 ŝ signifas malaltan kaj 20 ŝ altan semajnsalajron? Se 5 kompare kun 20 estas malalta, tiam 20 estas ankoraŭ pli malalta kompare kun 200. Se iu, kiu devas prelegi pri la termometro, komencus per fari de- klarojn pri altaj kaj malaltaj gradoj, li per tio perus nenian konon. Li devus unue diri al mi, kiel troveblas la frostopunkto kaj kiel la bolpunkto kaj kiel tiuj fiksj punktoj estas difinitaj de naturleĝoj, ne de la kaprico de la vendi- stoj aŭ produktistoj de termometroj. Koncerne salajron kaj profiton civitano Weston ne nur preterlasis dedukti tiajn fikspunktojn el ekonomiaj leĝoj, li eĉ ne konsideris necese serĉi ilin. Li kontentiĝis akcepti la kutimajn vulgar-es- primojn "malalta" kaj "alta" kiel tute klarajn esprimojn, kvankam evidentas ke salajroj nomeblas altaj aŭ malaltaj nur se oni komparas ilin kun normo laŭ kiu mezurendus iliaj grandoj.

Li ne kapablos klarigi al mi, kial donita monsumo estas donata por donita laborkvanto. Se li respondus al mi, "tio estis difinita de la leĝo de propono kaj postulo", mi unue demandus lin, per kiu leĝo propono kaj postulo estas mem reguligataj. Kaj tiu objekto tuj senarmigus lin. La rilatoj inter propono kaj postulo de laboro spertas konstante ŝanĝojn kaj kun ili ankaŭ la merkatrezoj de laboro. Kiam la postulo superas la proponon, altiĝas la salajro; kiam la propono superas la postulon, malaltiĝas la salajro, kvankam

en tiaj kondiĉoj povus fariĝi necese ekscii la realan staton de postulo kaj alveno per striko ekz-e aŭ alimaniere. Sed se vi agnoskas proponon kaj postulon kiel la leĝon kiu reguligas la salajron, tiam estus same infanece kiel senutile tondri kontraŭ salajroaltigo, ĉar perioda salajroaltigo, laŭ la plej supera leĝo kiun vi invokas, estas same necesa kaj laŭleĝa kiel perioda malaltiĝo de la salajro. Sed se vi *ne* agnoskas proponon kaj postulon kiel leĝon kiu reguligas la salajron, mi denove demandas, kial certa monsumo estas donata por certa laborkvanto?

Sed por rigardi la aferon pli amplekse: Vi estus tre eraraj, se vi kredus, ke la valoro de la laboro aŭ de ia ajn alia varo estus lastinstance difinita de propono kaj postulo. Propono kaj postulo reguligas nenion ol la preterpasajn *fluktadojn* de la merkatoj. Ili povas klarigi al vi, kial la merkato de varo altiĝas super ĝia *valoro* aŭ malaltiĝas sub ĝi, sed ili povas neniam doni klarigon pri tiu *valoro* mem. Supozate, ke propono kaj postulo tenas sin en ekvilibro aŭ, kiel diras la ekonomistoj, kovras sin. Nu, en la sama momento, en kiu tiuj kontraŭaj fortoj egaliĝas, ili reciproke nuligas sin kaj ne efikas plu en unu aŭ alia direkto. En la momento, en kiu propono kaj postulo estas en ekvilibro kaj tial ĉesas efiki, la *merkato* de varo identas kun sia *reala valoro*, kun la normala prezo, ĉirkaŭ kiu oscilas la merkatoj. Ĉe esplorado de tiu *valoro* ni havas do tute nenion plu por fari kun la preterpasaj efikoj de propono kaj postulo. La samo validas pri salajro kiel pri la prezoj de ĉiuj ceteraj varoj.

5. Salajroj kaj prezoj

Reduktitaj al sia plej simpla teoria esprimo, ĉiuj argumentoj de nia amiko solviĝas en la solan dogmon: *"La varprezoj estas difinitaj aŭ reguligataj de la salajroj"*.

Mi povus referenci la praktikan observadon, por atesti kontraŭ tiu falsa konkludo. Mi povus atentigi ke la anglaj fabriklaboristoj, ministoj, ŝipkonstruistoj ktp., kies laboro estas relative alte pagata, per la malkareco de sia produkto superas ĉiujn aliaj naciojn, dum ekz-e la anglan kamplaboriston, kies laboro estas relative malalte pagata, pro la kareco de lia produkto preskaŭ ĉiu alia nacio superas. Per komparo de varoj de unu sama lando kaj inter varoj de diversaj landoj mi povus - krom kelkaj pli ŝajnaj ol realaj esceptoj - pruvi, ke mezume alte pagata laboro produktas malaltprezajn varojn kaj malalte pagata laboro altprezajn varojn. Kompreneble tio ne estus pruvo por tio ke la alta prezo de laboro en la unua kaj ĝia malalta prezo en la alia okazo estas la respektivaj kaŭzoj de tiel diametre kontraŭaj efikoj, tamen tio estus ĉiukaze la pruvo, ke la prezoj de la varoj ne estas difinitaj de la prezoj de la laboro. Sed estas por ni tute superflue apliki tiun empirian metodon.

Eble oni povus nei, ke civitano Weston starigis la dogmon: *"La varprezoj estas difinitaj aŭ reguligataj de la laborsalajroj"*. Fakte li neniam eldiris tion. Sed li diris, ke profito kaj rento estas ankaŭ partoj de la varprezoj, ĉar estas la varprezoj el kiuj pagendas ne nur la salajroj de la laboristo, sed ankaŭ la profitoj de la kapitalisto kaj la rentoj de la grundoposedanto. Sed kiel li imagas la prezfarigon? Unue per la laborsalajro. Poste estas aldonata kroma elcentaĵo favore al la kapitalisto kaj kroma favore al la grundoposedanto. Supozate ke la salajro estus 10. Se la profitkvoto estus 100 %, la kapitalisto aldonus 10 al la antaŭdonita laborsalajro, kaj se la rentokvoto estus ankaŭ 100 % de la laborsalajro, estus aldonitaj kromaj 10, kaj la suma prezo de la varo estus 30. Sed tia difino de la prezoj estus simple ilia difino per la salajro. Se en la supra kazo la salajro kreskus al 20, tiam la prezo de la varo al 60, ktp. Laŭ tio, ĉiuj malaktualaj ekonomiaj verkistoj, kiuj volis agnoski la dogmon ke la salajro reguligas la prezojn, provis fari tion per tio ke ili pri-traktis la profiton kaj renton kiel *nurajn elcentaĵajn aldonojn al la salajro*.

Kompreneble neniu el ili kapablis redukti la limojn de tiuj elcentaĵoj al ia ajn ekonomia leĝo. Anstataŭe ili ŝajnis pensi ke la profitoj estas difinitaj de tradicio, kutimo, la volo de la kapitalisto aŭ de ia ajn alia same arbitra kaj neklarigebla metodo. Kiam ili asertas, ke la konkurenco inter la kapitalistoj difinas ilin, ili diras nenion. Sendube estas tiu konkurenco, per kiu la diversaj profitkvotoj en la diversaj komercaj branĉoj estas egaligataj aŭ reduktataj al mezuma nivelo, sed ĝi povas neniam difini tiun nivelon mem aŭ la ĝeneralan profitkvoton.

Kio estas dirita, se iu diras, ke la varprezoj estas difinitaj de la salajro? Ĉar salajro estas nur alia nomo por la prezo de la laboro, do per tio li celas ke la prezoj de la varoj estas reguligataj per la prezo de la laboro. Ĉar "prezo" estas interŝanĝ-valoru - kaj kiam mi parolas pri valoro, temas ĉiam pri interŝanĝvaloru -, do interŝanĝvaloru *esprimita en mono*, la frazo kondukas al tio ke *"la valoro de la varoj estas difinita per la valoro de la laboro"* aŭ ke *"la valoro de la laboro estas la ĝenerala valormezurilo"*.

Sed kiel tiam estas difinita la *"valoro de la laboro"* mem? Ĉi tie ni alvenas al morta punkto. Al morta punkto kompreneble nur, se ni provas logike konkludi. La predikistoj de tiu doktrino tamen agas sencere monie kun logikaj skrupuloj. Ekzemple nia amiko Weston. Unue li klarigis al ni ke la salajro difinas la varprezon kaj ke sekve per la altiĝo de la salajro la prezoj devas altiĝi. Poste li faris turniĝon por kredigi al ni ke salajroaltiĝo taŭgas por nenio, ĉar la varprezoj kreskus kaj ĉar la salajroj estas efektive mezurataj per la prezoj de la varoj, por kiuj ili estas elspezataj. Tiel ni komencas per la aserto, ke la valoro de la laboro difinas la valoron de la varoj, kaj finas per la aserto, ke la valoro de la varoj difinas la valoron de la laboro. Tiel ni turniĝas en alte erara rondo kaj venas al absolute nenia konkludo.

Entute estas klare, ke, se oni faras la valoron de varo, ekzemple de laboro, greno aŭ de ajna alia varo, ĝenerala mezurilo kaj regulilo de la valoro, oni nur deŝovas la malfacilon de si, ĉar oni difinas unu valoron per alia, kiu sialvice bezonas difinon.

Reduktita al sia plej abstrakta esprimo, la dogmo ke "la laborsalajro difinas la valoron" signifas ke "valoro estas difinita de valoro", kaj tiu taŭtolo

gio signifas, ke ni scias en realo absolute nenion pri la valoro. Se ni tenas nin je tiu premiso, ĉia rezonado pri la ĝeneralaj leĝoj de la politika ekonomio fariĝas sensenca babilajo. Pro tio estis la granda merito de Ricardo, ke li en 1817 publikigita verko "*On the Principles of Political Economy*" neniiĝis la malnovan, kutiman kaj triviale falsan konkludon, kiun Adam Smith kaj liaj francaj antaŭuloj en la vere sciencaj partoj de siaj esploraĵoj estis forlasintaj, kiun ili tamen en la pli esoteraj kaj supraĵaj ĉapitroj ree akceptis.

6. Valoro kaj laboro

Civitanoj, mi alvenis nun al punkto, kie mi devas pritrakti la veran disvolvadon de la demando. Mi ne povas promesi fari tion kontentige, ĉar alie mi estus devigata pritrakti la tutan kampon de la politika ekonomio. Mi povas, kiel dirus la francoj, nur "*effleurer la question*", tuŝi la ĉefajn punktojn.

La unua demando, kiun ni devas starigi, estas tiu: Kio estas la *valoro* de varo? Kiel ĝi estas difinata?

Unua-vide povus ŝajni, ke la valoro de varo estas io tute *relativa* kaj sen rigardo de unu varo en siaj rilatoj al ĉiuj aliaj varoj tute ne difinebla. Efektive, se ni parolas pri valoro, pri la interŝanĝvaloro de varo, ni celas la kvantajn proporciojn per kiuj ĝi interŝanĝeblas kun ĉiuj aliaj varoj. Sed tiam leviĝas la demando: Kiel tiuj proporcioj estas reguligataj, en kiuj varoj interŝanĝas?

Ni scias el sperto, ke tiuj proporcioj estas senfine diversaj. Ni prenu unuopan varon, ekz-e tritikon, tiam ni trovas ke Kvarono da tritiko interŝanĝiĝas en preskaŭ sennombraj variaĵoj de proporcioj kun la plej diversaj varoj. Tamen, *ĉar ĝia valoro restas ĉiam la sama*, ĉu esprimata en silko, oro aŭ ia ajn alia varo, ĝi devas esti io diversa kaj sendependa de tiuj *diversaj proporcioj de interŝanĝo* kun diversaj artikloj. Devas esti eble esprimi tiujn plej diversajn egaligojn kun diversaj varoj en formo tre diversa de tio.

Se mi krome diras, ke Kvarono da tritiko interŝanĝiĝas en certa proporcio kun fero aŭ ke la valoro de Kvarono da tritiko esprimiĝas en certa kvanto de fero, tiam mi diras, ke la tritik-valoro kaj ĝia ekvalento en fero egalas al *io tria*, kio estas nek tritiko nek fero, ĉar mi ja kondiĉas ke ambaŭ esprimas la saman grandon en du diversaj formoj. Ĉiu de ambaŭ, la tritiko kaj la fero, devas do sendepende de la alia esti reduktebla al tiu tria, kiu estas ilia komuna mezuro.

Tutsimpla geometria ekzemplo ilustru tion. Kiel ni faras, se ni komparas

la areon de trianguloj de ĉiaspecaj formo kaj grando aŭ de trianguloj kun rektanguloj aŭ aliaj rektliniaj figuroj? Ni reduktas la areon de ĉiu ajn triangulo al esprimo tute malsama ol ĝia videbla formo. Post kiam ni eltrovis el la naturo de la triangulo, ke ĝia areo egalas al la duona oblo el ĝia bazlinio kaj ĝia alto, ni povas nun kompari la diversajn areojn de ĉiuj specoj de trianguloj kaj ĉiaspecajn rektliniajn figurojn unu kun la aliaj, ĉar ili ĉiuj dispartigeblas en certa nombro da trianguloj.

La sama metodo aplikendas ĉe la valoroj de ĉiuj varoj. Ni devas esti kapablaj redukti ilin ĉiujn al esprimo komuna al ĉiuj kaj distingi ilin nur per la proporcioj en kiuj ili entenas ĝuste tiun, kaj identan, mezuron.

Ĉar la *interŝanĝvaloroj* de la varoj estas nur *sociaj funkcioj* de tiuj aĵoj kaj havas nenion por fari kun iliaj *naturaj* kvalitoj, leviĝas unue la demando: Kio estas la komuna *socia substanco* de ĉiuj varoj? Ĝi estas la *laboro*. Por produkti varon, aplikendas certa kvanto da laboro por ĝi aŭ enlaborigendas en ĝin. Ĉe tio mi diras ne nur laboro, sed *socia laboro*. Kiu produktas aĵon por sia propra rekta uzado, por konsumi ĝin mem, ja kreas *produkton*, sed ne *varon*. Kiel memmastrumanta produktisto li havas nenion por fari kun la socio. Sed por produkti *varon*, la aĵo produktita de li devas ne nur kontentigi *socian* bezonon, sed lia laboro mem devas esti konsista parto kaj ero de la tuta laborsumo elspezata de la socio. Lia laboro devas esti parto de la *labor-divido ene de la socio*. Ĝi estas nenio sen la aliaj partlaboroj, kaj estas necese ke por sia parto ĝi kompletigas tiujn.

Kiam ni konsideras *varojn kiel valorojn*, tiam ni rigardas ilin ekskluzive sub la sola aspekto de la en ĝi *konkretigita, reprezentita* aŭ, se vi volas, *kristaliĝinta socia laboro*. Tiurilate ili povas nur *distingi* sin per la pli grandaj aŭ pli malgrandaj laborkvantoj en ili reprezentataj, kiel ekz-e en silka naztuko povas esti konsumita pli granda laborkvanto ol en briko. Sed kiel oni mezuras *laborkvantojn*? Laŭ la *daŭro de la labortempo*, mezurante la laboron laŭ horo, tago ktp. Por apliki tiun mezuron, oni kompreneble reduktas ĉiujn laborspecojn al mezuma aŭ simpla laboro kiel unuo.

Ni venas do al jena konkludo. Varo havas valoron, ĉar ĝi estas *kristaliĝo de socia laboro*. La *grando* de ĝia valoro aŭ ĝia *relativa* valoro dependas de

la pli granda aŭ pli malgranda kvanto de tiu en ĝi entenata socia substanco; do de la relativa laborkvanto necesa por ĝia produktado. La *relativaj valoroj de la varoj* estas do difinitaj per la *respektivaj en ili enlaborigitaj, konkretiĝitaj, reprezentataj kvantoj de laboro*. La *korelativaj varkvantoj*, kiuj produkteblas en la *sama labortempo*, estas *egalaj*. Aŭ la valoro de varo rilatas al la valoro de alia varo kiel la kvanto de la en unu varo reprezentata laboro al la kvanto de la en la alia varo reprezentata laboro.

Mi suspektas, ke multaj el vi demandas sin: Ĉu efektive ekzistas tiom granda aŭ entute ia diferenco inter la difino de la valoroj de la varoj per la *salajro* kaj ilia difino per la *relativaj laborkvantoj* necesaj por ilia produktado? Vi intertempe certe rimarkis, ke la monkompenso por la laboro kaj la laborkvanto estas tute diversaj aferoj. Supozate ekz-e ke en Kvarono da tritiko kaj unco da oro estas reprezentataj *samaj laborkvantoj*. Mi reuzas tiun ekzemplon, ĉar *Benjamin Franklin* uzis ĝin en sia unua eseo publikigita 1729 sub la titolo "*A Modest inquiry into the Nature and Necessity of a Paper Currency*" kaj en kiu li kiel unu el la unuaj trovis la spuron de vera naturo de la valoro. Bone. Ni supozigas nun, ke Kvarono da tritiko kaj unco da oro estas la *samaj valoroj* aŭ *ekvivalentoj*, ĉar ili estas *kristaliĝoj de samaj kvantoj da mezuma laboro* de certa nombro da labor-tagoj aŭ -semajnoj reprezentataj en ili. Ĉu ni per tio, ke ni difinas la relativajn valorojn de oro kaj de tritiko, iel ajn referencas la salajrojn de la kamplaboristo kaj de la ministro? Absolulte ne. Ni lasas tute *nedifinite*, kiel ilia taga aŭ semajna laboro estas pagata, eĉ ĉu entute salajra laboro estis aplikita. Se tio okazis, la salajro povis esti tre malsama. La laboristo, kies laboro estas konkretigita en la Kvarono da tritiko, eble ricevis nur 2 Bushel, la en la minejo dungita laboristo eble unu duonon de la unco da oro. Aŭ, supozate ke iliaj salajroj estis samaj, tiuj povas devii en ĉiaj eblaj proporcioj de la valoroj de la varoj produktitaj de ili. Ili povas esti la duono, triono, kvarono aŭ ĉia alia parto de tiu Kvarono da greno aŭ de tiu unco da oro. Iliaj *salajroj* kompreneble ne povas *superi* la valorojn de la varoj produktitaj de ili, ili ne povas esti *pli grandaj*, sed ili povas esti en ĉia ebla grado *pli malgrandaj*. Iliaj *salajroj* certe *havas* siajn limojn ĉe la *valoroj* de la produktoj, sed la *valoroj de iliaj produktoj* certe ne havas la limojn ĉe iliaj salajroj. Sed jen la ĉefa afero: la valoroj, la relativaj valoroj de tritiko kaj oro ekz-e, estas fiksitaj sen ajna konsidero al la valoro de la aplikita laboro, do de la *salajro*. La difino de la varvaloroj per la *la*

borkvanto reprezentita en ili estas do io tute alia ol la taŭtologia maniero difini la valoron de la varoj per la valoro de la laboro aŭ *salajro*. Sed tiu punkto estos en la sekvo de nia esplorado pli detale prilumata.

Ĉe kalkulado de la interŝanĝvaloro de varo ni devas aldoni al la kvanto de la *laste* al ĝi aplikita laboro ankoraŭ la laborkvanton *antaŭe* en la krudmaterialon enlaborigitan, krome la laboron aplikitan en la ilaro, instrumentoj, maŝinaro kaj konstruaĵoj, kiuj kunefikas ĉe tiu laboro. Ekzemple la valoro de iu kvanto da kotonfadeno estas la kristaliĝo de laborkvanto aldonita al la kotono dum la ŝpinado, de la laborkvanto antaŭe konkretigita en la kotono mem, de la laborkvanto konkretigita en karbo, oleo kaj aliaj konsumitaj helpmaterialoj, de la laborkvanto reprezentita en la vapormaŝino, la ŝpiniloj, la fabrikkonstruaĵoj ktp. La produktiloj proprasence, kiel instrumentoj, maŝinaro, konstruaĵoj, servas por pli aŭ malpli longa periodo ĉiam denove dum ripetaj produktprocesoj. Se ili estus forkonsumitaj unufoje kiel la krudmaterialo, tiam ilia tuta valoro estus unufoje transigita al la varoj ĉe kies produktado ili kunefikis. Sed ĉar ŝpinilo ekz-e nur iom post iom eluziĝas, pro la mezuma tempo en kiu ĝi daŭras kaj ĝia iom-post-ioma eluziĝo aŭ ĝia mezuma konsumiĝo dum certa periodo, ekz-e de unu tago, oni faras mezuman kalkuladon. Tiel ni kalkulas, kiom da valoro de la ŝpinilo estas transigata al la ĉiutage ŝpinata fadeno kaj do kiom de la tuta kvanto de la ekz-e en pundo da fadeno konkretigita laboro estas la antaŭe en la ŝpinilo konkretigita laboro. Por nia nuna celo ne estas necese resti pli longe ĉe tiu punkto.

Povus ŝajni, ke, se la valoro de varo estas difinita per la *laborkvanto aplikita al ĝia produktado*, ju pli pigra aŭ mallerta estas homo, des pli valora lia varo, ĉar la tempo estas des pli granda kiu necesas por ellaborado de la varo. Sed tio estus bedaŭrinda eraro. Vi certe memoras ke mi uzis la vorton "*socia laboro*", kaj tiu kvalifiko "*socia*" entenas multajn elementojn en si. Se ni diras ke la valoro de varo estas difinita per la en ĝi enlaborita aŭ kristaliĝinta *laborkvanto*, tiam ni celas la *laborkvanton necesan* por ĝia produktado en donita socia stato, sub certaj sociaj mezumaj kondiĉoj de la produktado, kun donita socia mezuma intenseco kaj mezuma lerteco de la aplikata laboro. Kiam en Anglio la vaporteksilo ekkonkurencis kun la manteksilo, eknecesis nur duono da labortempo ol antaŭe, por transformi donitan kvanton da deno en ulnon da kotonteksaĵo aŭ tuko. La malriĉa manteksisto laboris

nun 17 aŭ 18 horojn tage anstataŭ 9 aŭ 10 horojn antaŭe. Sed la produkto de lia dudekhora laboro reprezentis nun jam nur 10 horojn da socia laboro aŭ 10 horojn da laboro, socie necesajn por transformi certan kvanton da fadeno en teksaĵojn. La produkto de liaj 20 horoj do ne havis pli da valoro ol la produkto de liaj antaŭaj 10 horoj.

Se nun la kvanto de en la varoj konkretigita socie necesa laboro reguligas ilian interŝanĝvaloron, tiam ĉia altiĝo de la laborkvanto necesa por produktado de varo devas pligrandigi ĝian valoron, kiel ĉia malaltiĝo devas redukti ĝin.

Se la respektivaj laborkvantoj necesaj por produkti la respektivajn varojn restus konstantaj, tiam iliaj relativaj valoroj estus ankaŭ konstantaj. Sed tio ne estas la kazo. La laborkvanto necesa por produktado de varo ŝanĝiĝas ĉiutage kun la ŝanĝo en la produktivo de la aplikata laboro. Ju pli granda la produktivo de la laboro, des pli da produkto estas ellaborata en la donita laborotempo, kaj ju pli malgranda la laborproduktivo, des malpli. Se ekz-e okazas ke pro la kresko de la loĝantaro necesas ekkulturi malpli fertilan grundon, tiam la sama kvanto da produkto atingeblus nur se oni elspezas pli grandan kvanton da laboro, kaj la valoro de la kampkultura produkto sekve kreskus. Aliflanke, se unuopa ŝpinisto per modernaj produktiloj en unu laborotago transformas multmiloble pli grandan kvanton da kotono en fadenon ol li povintus en la sama tempo ŝpini per ŝpinrado, tiam klaras, ke ĉiu unuopa pundo da kotono ensuĉos multmiloble malpli da ŝpinlaboro ol antaŭe kaj sekve ke la valoro aldonita per la ŝpinado al ĉiu unuopa pundo da kotono estas multmiloble pli malalta ol antaŭe. La valoro de la fadeno laŭproporcie malaltiĝas.

Senkonsidere al la malsamecoj en la naturaj energioj kaj la akiritaj laborlertecoj de diversaj popoloj, la produktivo de la laboro devas esence dependi:

1. de la *naturkondiĉoj* de la laboro, kiel fertileco de la grundo, riĉeco de la minejoj ktp.

2. de la progresanta perfektigo de la *sociaj fortoj de la laboro*, ki

uj devenas el la grandskala produktado, koncentriĝo de la kapitalo kaj kombinado de la laboro, labordivido, maŝinaro, plibonigitaj metodoj, aplikado de ĥemiaj kaj aliaj naturaj fortoj, kunpremado de tempo kaj spaco per komunikiloj kaj transportiloj kaj per ĉia alia institucio per kiu la scienco trudas naturfortojn en la servon de la laboro kaj per kiu disvolviĝas la socieco aŭ koopereco de la laboro. Ju pli granda la produktivo de la laboro, des pli malgranda la laboro aplikata al donita kvanto de produkto; do des pli malgranda la valoro de la produkto. Ju pli malgranda la produktivo de la laboro, des pli granda la laboro aplikata al la sama kvanto de produkto; des pli granda do ĝia valoro. Ni povas do starigi kiel ĝeneralan leĝon:

La valoroj de la varoj estas rekte proporciaj al la labortempoj aplikitaj al ilia produktado - kaj inverse proporciaj al la produktivo de la aplikita laboro.

Post kiam mi ĝis nun parolis pri la *valor*o, mi aldonu ankoraŭ kelkajn vortojn pri la *prezo*, kiu estas aparta formo kiun alprenas la valoro.

Prezo en si mem estas nenio alia ol la *monesprimo de la valoro*. Ĉi-lande ekz-e la valoroj de ĉiuj varoj estas esprimataj en orprezoj, sed sur la kontinento ĉefe en arĝentoprezoj. La valoro de oro aŭ arĝento kiel tiu de ĉiuj aliaj varoj estas reguligata de la laborkvanto necesa por ilia akiro. Certan kvanton de viaj enlandaj produktoj, en kiuj certa kvanto de via nacia laboro estas kristaliĝinta, vi interŝanĝas kontraŭ la produkto de la or- kaj arĝento-produktantaj landoj en kiu estas kristaliĝinta certa kvanto da ilia laboro. Tiamaniere, fakte per interŝanĝ-komercio, vi lernas esprimi en oro kaj arĝento la valorojn de ĉiuj varoj, do la respektivajn en ili aplikitajn laborkvantojn. Se rigardi iom pli detale la *monesprimon de valoro*, aŭ, kio estas sama, la *transformiĝon de valoro en prezon*, vi rimarkas ke tio estas metodo per kiu vi donas al la valoroj de ĉiuj varoj *sendependan kaj homogenan formon* aŭ esprimas ilin en kvantoj de sama socia laboro. En la mezuro en kiu la prezo estas nenio alia ol la monesprimo de la valoro, Adam Smith nomis ĝin la "*naturan prezon*", la francaj fiziokratoj la "*prix nécessaire*" [necesan prezon].

Kia rilato ekzistas inter *valoroj kaj merkaptoprezoj* aŭ inter *naturaj prezoj kaj merkaptoprezoj*? Vi ĉiuj scias, ke la merkaptoprezoj estas por ĉiuj samspecaj

varoj *la sama*, kiom ajn diversaj povas esti la kondiĉoj de produktado por la unuopaj produktistoj. La merkaptoprezoj esprimas nur la *mezuman kvanton da socia laboro* necesa sub la mezumaj kondiĉoj de produktado por provizo de la merkato per certa kvanto de certa artiklo. Ĝi estas kalkulata el la tutaĵo de ĉiuj varoj de certa speco.

En tio, la *merkaptoprez*o de varo kovriĝas kun ĝia *valoro*. Aliflanke la fluktuadoj de la merkaptoprezoj foje super, foje sub la valoro aŭ la natura prezo dependas de la fluktuadoj de la propono kaj de la postulo. Flankiĝoj de la merkaptoprezoj de la valoroj okazas do konstante, sed, diras *Adam Smith*:

"La natura prezo estas do iel la centro, al kiu konstante gravitas la prezoj de ĉiuj varoj. Diversaj hazardoj povas levi ilin kelkfoje alte super ĝin kaj kelkfoje sub ĝin. Sed kia ajn estas la cirkonstancoj, kiuj malhelpas ilin halti en tiu centro de trankvilo kaj inerto, ili konstante alstrebas ĝin."

Mi ne povas nun pli detaligi tiun punkton. Sufiĉas diri, ke, *se* propono kaj postulo estas en ekvilibro, la merkaptoprezoj de la varoj esprimas iliajn naturajn prezojn, do la respektivajn valorojn de la laborkvantoj necesaj por ilia produktado. Sed propono kaj postulo *devas* ĉiam strebi kompensi sin reciproke, kvankam tio okazas nur per tio ke unu fluktuado estas nuligata de alia, iu kresko estas kompensata per malkresko, kaj inverse. Se vi, anstataŭ rigardi nur la ĉiutagajn fluktuadojn, analizas la moviĝon de la merkaptoprezoj por pli longaj periodoj, kiel faris ekz-e Tooke en sia "*History of Prices*", vi trovos ke la fluktuadoj de la merkaptoprezoj, iliaj devojiĝoj de la valoroj, iliaj kreskoj kaj malkreskoj kompensas sin reciproke kaj nuligas sin, tiel ke, aparte de la efiko de monopoloj kaj kelkaj aliaj modifaĵoj, kiujn mi devas ĉi tie preterlasi, ĉiuj specoj de varoj estas mezume vendataj je siaj respektivaj *valoroj* aŭ naturaj prezoj. La mezumaj periodoj, dum kiuj la fluktuadoj de la merkaptoprezoj nuligas sin reciproke, estas por diversaj varspecoj diversaj, ĉar per iu speco sukcesas pli facile ol per alia adapti la proponon al la postulo.

Se nun, pli ĝenerale parolate kaj inkluzive de iom pli longaj periodoj, ĉiuj specoj de varoj estas vendataj je siaj respektivaj valoroj, tiam estas sence supozi ke la konstantaj kaj en diversaj komercbranĉoj kutimaj profitoj - kaj ne la profito en unuopaj kazoj - originas el aldono al la prezoj de la varoj aŭ

el tio ke ili estas vendataj je prezo multe pli alta ol ilia *valoro*. La absurdeco de tiu imago evidentas ekde kiam ĝi estas ĝeneraligita. Tion, kion iu kiel vendisto konstante gajnas, li kiel aĉetanto same konstante perdas. Kondukus al nenio, se oni volus diri, ke ekzistas homoj kiuj estas aĉetantoj sen esti vendantoj, aŭ konsumantoj sen esti produktantoj. Kion tiuj homoj pagas al la produktistoj, tion ili devas unue ricevi de ili. Se iu unue prenas vian monon kaj poste redonas ĝin per tio ke li vendas viajn varojn, tiam vi neniam riĉiĝos per tio ke vi vendos al tiu sama homo viajn varojn tro multekoste. Tia spezo povus malpliigi perdon, sed neniam kondukos al realigo de gajno.

Do por klarigi la *ĝeneralan econ de la profito*, vi devas eliri el la principo, ke mezume varoj estas vendataj *je siaj veraj valoroj* kaj ke *profitoj devenas el la vendo de la varoj je iliaj valoroj*, do en rilato al la en ili konkretigita laborkvanto. Se vi ne povas klarigi la profiton sub tiuj kondiĉoj, tiam vi tute ne povas klarigi ĝin. Tio ŝajnas paradoksa kaj kontraŭdira al la ĉiutaga observado. Estas same paradokse, ke la Tero ĉirkaŭiras la Sunon kaj ke akvo konsistas el du ekstreme facilbrulemaj gasoj. Scienca vero estas ĉiam paradoksa el vidpunkto de ĉiutaga sperto, kiu perceptas nur la trompan ŝajnon de la aferoj.

7. La laborforto

Post kiam ni nun, laŭ tio kio eblis en tiel supraĵa maniero, analizis la econ de la *valoro*, de la *valoro de ĉia ajn varo*, ni devas direkti nian atenton al la specifa *valoro de la laboro*. Kaj ĉi tie mi devas denove surprizi vin per ŝajna paradokso. Vi ĉiuj estas firme konvinkitaj, ke tio, kion vi ĉiutage vendas, estas via laboro; ke do la laboro havas sian prezon kaj ke, ĉar la prezo de varo estas nur la monesprimo de sia valoro, devas certe ekzisti io kiel la *valoro de la laboro*. Tamen ekzistas nenio tia kio estas en la kutima senco de la vorto nomata *valoro de la laboro*. Ni vidis, ke la kvanto de necesa laboro kristaliĝinta en varo konsistigas ties valoron. Kiel ni povas nun, aplikante tiun valornocion, difini la valoron ekzemple de dekhora labortago? Kiom da laboro entenas tiu labortago? Dekhoran laboron. Diri pri la valoro de dekhora labortago ke ĝi egalas al dekhora laboro aŭ al la laborkvanto entenata en ĝi, estus taŭtologia kaj krome sensenca esprimo. Post kiam ni fine trovis la ĝustan, sed kaŝitan sencon de la esprimo "*valoro de la laboro*", ni kompreneble kapablas ĝuste interpreti tiun malracian kaj ŝajne maleblan aplikon de la nocio valoro, same kiel ni kapablas ekkoni la ŝajnan aŭ nur fenomenan moviĝon de la astroj, post kiam ni foje ekkonis ilian veran moviĝon.

Kion vendas la laboristo, estas ne rekte lia *laboro*, sed lia *laborforto*, kiun li provizore disponigas al la kapitalisto. Tio estas tiom la kazo, ke - mi ne scias, ĉu per angla leĝo, sed ĉiukaze per kelkaj leĝoj sur la kontinento - la *maksimuma daŭro*, por kiu homo rajtas vendi sian laborforton, estas fiksita. Se estus al li permesate fari tion por ĉiu ajn tempospaco, tiam tuj reestabliĝus la sklaveco. Se tia vendo koncernus ekz-e lian tutan vivodaŭron, li per tio fariĝus tuj vivolonga sklavo de sia salajro-mastro.

Iu el la plej malnovaj ekonomikistoj kaj plej originalaj filozofoj de Anglio - *Thomas Hobbes* - atentigis en sia "*Leviathan*" jam antaŭsente pri tiu punkto pretervidata de ĉiuj liaj posteuloj. Li diras:

"*La valoro de homo estas, kiel tiu de ĉiuj aliaj aĵoj, lia prezo: tio signifas kiom estus donata por la uzado de lia forto.*"

Elirante de tiu bazo ni kapablos difini la *valoron de la laboro* kiel tiun de ĉiuj aliaj varoj.

Sed antaŭ ol fari tion, ni povus demandi, de kie venas tiu stranga fenomeno, ke ni trovas sur la merkato grupon da aĉetantoj kiuj estas posedantoj de grundo, de maŝinaro, de krudmaterialo kaj de vivrimedoj, kiuj estas ĉiuj, aparte de la grundo en sia kruda stato, *produktoj de laboro*, kaj aliflanke grupon de vendistoj, kiuj havas nenion por vendi krom sian laborforton, siajn laborajn brakojn kaj cerbojn. Ke la unua grupo konstante aĉetas por fari profitojn kaj riĉiĝi, dum la alia konstante vendas por perlabori siajn vivrimedojn? La esplorado de tiu demando estus esplorado pri tio kion la ekonomikistoj nomas "*Antaŭa aŭ origina akumulado*", sed kio devus esti nomata *origina eksproprietigo*. Ni trovus ke tiu tielnomata *origina akumulado* signifas nenion alian ol vicon da historiaj procesoj, kiuj rezultigis en *disigo de la origina unueco* inter la laboranto kaj liaj laboriloj. Sed tia esplorado troviĝas ekster la kadro de nia nuna temo. Ekde kiam la *disigo* inter la laborulo kaj la laboriloj estas plenumita, tiu stato konserviĝos kaj reproduktiĝos ĉiam pli grandskale, ĝis kiam nova kaj ĝisfunda ŝanĝiĝo de la produktmaniero siavice renversas ĝin kaj restarigas la originan unuecon en nova historia formo.

Kio estas do la *valoro de la laborforto*?

Kiel tiu de ĉia alia varo la valoro estas difinita per laborkvanto necesa por ĝia produktado. La laborforto de homo ekzistas nur en sia vivanta korp-eco. Certan kvanton da vivrimedoj homo devas konsumi por elkreski kaj teni sin viva. Sed la homo estas submetita, kiel la maŝino, al eluzo kaj devas esti anstataŭigata per alia homo. Krom la vivrimedojn necesajn por *sia propra* vivteno li bezonas kroman kvanton da vivrimedoj por kreskigi certan nombron da infanoj, kiuj anstataŭos lin sur la labormerkato kaj devas eternigi la specon de laboristoj. Eĉ pli, por disvolvi sian laborforton kaj akiri certan lertecon estas necese elspezi kroman kvanton da valoroj. Por nia celo sufiĉas nur konsideri la *mezuman* laboron, kies eduko- kaj formado-kostoj estas nane malaltaj grandoj. Tamen mi devas uzi tiun okazon por la konstato, ke, same kiel la produktokostoj por laborfortoj de diversa kvalito estas ja diversaj, ankaŭ la valoroj de la laborfortoj dungitaj en diversaj komercobranĉoj devas

esti diversaj. La krio je *egaleco de la salajroj* baziĝas do sur eraro, estas ne-plenumebla *malsaĝa* deziro. Ĝi estas la frukto de tiu falsa kaj plata radikalismo kiu akceptas la kondiĉojn sed ŝatus eviti la konkludojn. Surbaze de la salajrosistemo la valoro de la laborforto estas difinata en la sama maniero kiel tiu de ĉiu alia varo, kaj ĉar diversaj specoj de laborforto havas diversajn valorojn aŭ necesigas diversajn laborkvantojn por sia produktado, ili *devas* alceli diversajn prezojn sur la labormarkato. Krii por *egala aŭ eĉ justa salajro* surbaze de la salajrosistemo estas same kiel surbaze de la sklavismo krii por *libereco*. Kion vi konsideras prava aŭ justa, tio ne estas la demando. La demando estas: Kio estas ĉe donita produktad-sistemo necesa kaj neevitebla?

Post tiuj klarigoj devus esti klare, ke la *valoro de la laborforto* estas difinita per la *valoro de la vivrimedoj* kiuj necesas por la produktado, disvolvado, konservado kaj eternigo de la laborforto.

8. La produktado de la plusvaloro

Supozate nun, ke la produktado de la mezuma kvanto de ĉiutagaj vivrimedoj por laboranto bezonas *6 horojn da mezuma laboro*. Supozate ankaŭ krome, ke 6 horoj da mezuma laboro estas konkretigitaj en orkvanto egala al 3 ŝ. Tiam estus 3 ŝ la prezo aŭ monesprimo de la *tagvaloro de la laborforto* de tiu homo. Se li laborus ĉiutage 6 horojn, li produktus ĉiutage valoron sufiĉan por aĉeti la mezuman kvanton da siaj ĉiutagaj vivrimedoj aŭ vivteni sin mem kiel laboranton.

Sed nia homo estas salajrolaboristo. Li devas do vendi sian laborforton al kapitalisto. Se li vendas ĝin je 3 ŝ tage aŭ 18 ŝ semajne, tiam li vendas ĝin je ĝia valoro. Supozate ke li estas ŝpinisto. Se li laboras 6 horojn tage, li aldonas al la kotono valoron de 3 ŝ tage. Tiu valoro ĉiutage aldonata estus precize ekvivalento por la laborsalajro aŭ prezo de lia laborforto, kiun li ĉiutage ricevas. Sed tiukaze la kapitalisto ricevas *nenian plusvaloron* aŭ *plusproduktion*. Ĉi tie ni do alvenas ĉe la ĉefa punkto.

Per aĉeto de la laborforto de la laboristo kaj pago de ĝia valoro la kapitalisto akiris, kiel ĉiu alia aĉetanto, la rajton konsumi la aĉetitan varon aŭ uzi ĝin. Oni konsumas aŭ uzas la laborforton de homo per tio ke oni laborigas lin, kiel oni konsumas aŭ uzas maŝinon igante ĝin turniĝi. Per pago de la taga aŭ semajna valoro de la laborforto de la laboristo la kapitalisto akiris do la rajton uzi tiun laborforton dum *la tuta tago aŭ semajno* aŭ igi ĝin labori. La labortago aŭ la laborsemajno havas kompreneble certajn limojn, sed tiujn ni rigardos nur pli poste.

Por la momento mi ŝatus direkti vian atenton sur decidan punkton.

La *valoro* de la laborforto estas difinita per la laborkvanto necesa por ĝia konservado aŭ reproduktado, sed la *uzado* de tiu laborforto estas limigita nur de la aktivaj energioj kaj la korpoforto de la laboristo. La taga aŭ semajna *valoro* de la laborforto estas ja diversa de la ĉiutaga aŭ semajna *farado* de tiu forto, same kiel la nutraĵo kiun bezonas ĉevalo estas ja diversa de la tempo dum kiu ĝi povas porti la rajdiston. La laborkvanto, per kiu la *valoro* de

la laborforto de la laboristo estas limigita, tute ne formas la limon por la laborkvanto kiun lia laborforto kapablas plenumi. Ni prenu la ekzemplon de nia ŝpinisto. Ni vidis, ke li, por ĉiutage reprodukti sian laborforton, devas ĉiutage reprodukti valoron de 3 ŝ, kion li faras per tio ke li ĉiutage laboras 6 horojn. Sed tio ne malhelpas lin povi labori 10 aŭ 12 aŭ pli da horoj tage. Sed per la pago de la taga aŭ semajna *valoro* de la laborforto de la ŝpinisto la kapitalisto akiris la rajton uzi tiun laborforton dum *la tuta tago aŭ la tuta semajno*. Li do devigas lin labori, ni diru, 12 horojn tage. *Aldone al* la 6 horoj necesaj por kompensi sian salajron aŭ la valoron de sia laborforto, li devas do labori ankoraŭ *6 horojn*, kiujn mi volas nomi horojn de pluslaboro, *pluslaboro* kiu konkretiĝos en *plusvaloro* kaj *plusprodukto*. Se nia ŝpinisto ekz-e per sia ĉiutaga seshora laboro aldonas al la kotono valoron de 3 ŝ, valoron kiu konsistigas ekvivalenton por lia salajro, tiam en 12 horoj li aldonas al la kotono valoron de 6 ŝ kaj produktas *analogan pluson da fadeno*. Ĉar li vendis sian laborforton al la kapitalisto, la tuta de li kreita valoro aŭ lia tuta produkto apartenas al la kapitalisto, la portempa posedanto de lia laborforto. Per tio ke la kapitalisto antaŭpagas 3 ŝ, li realigas do valoron de 6 ŝ, ĉar nun por la valoro de li antaŭpagita, en kiu estas 6 laborhoroj konkretigitaj, estas valoro repagita en kiu estas kristaligitaj 12 laborhoroj. Per ĉiutaga ripeto de la sama proceso la kapitalisto ĉiutage antaŭpagas 3 ŝ kaj enpoŝigas ĉiutage 6 ŝ, de kiu duono ree elspeziĝas por pago de la salajro kaj la alia duono formas la *plusvaloron*, por kiu la kapitalisto ne pagas ekvivalenton. Estas *tiu speco de interŝanĝo inter kapitalo kaj laboro*, sur kiu baziĝas la kapitalisma produktmaniero aŭ la salajrosistemo kaj kiu devas konstante rezultiĝi en la reproduktado de la laboristo kiel laboristo kaj de la kapitalisto kiel kapitalisto.

La kvoto de la plusvaloro dependas, se ĉiuj aliaj cirkonstancoj restas samaj, de la proporcio inter la parto de la labortago necesa por reproduktiĝo de la valoro de la laborforto kaj la *pluslabortempo aŭ pluslaboro* plenumata por la kapitalisto. Ĝi do dependas de la *rilato*, en kiu *la labortago estas longigita ekster la daŭro* en kiu la laboristo per sia laboro reproduktus nur la valoron de sia laborforto aŭ sian salajron.

9. La valoro de la laboro

Ni devas nun reveni al la esprimo "*valoro aŭ prezo de la laboro*".

Ni vidis, ke ĝi estas efektive nenio ol la esprimo por la valoro de la laborforto mezurata laŭ la varvaloroj necesaj por ĝia konservado. Sed ĉar la laboristo ricevas sian salajron nur *post* plenumado de la laboro kaj krome scias, ke, kion li fakte donas al la kapitalisto, estas lia laboro, tial la valoro aŭ prezo de lia laborforto ŝajnas al li nepre esti la *prezo aŭ valoro de lia laboro mem*. Se la prezo de lia laborforto egalas 3 ŝ, en kiu 6 laborhoroj estas konkretigitaj, kaj se li laboras 12 horojn, li nepre konsideras tiujn 3 ŝ kiel la valoron aŭ prezon de 12 laborhoroj, kvankam tiuj 12 laborhoroj konretiĝas en valoro de 6 ŝ. El tio sekvas du aferoj:

Unue. La valoro aŭ prezo de la laborforto alprenas la aspekton de la *prezo aŭ valoro de la laboro mem*, kvankam, precize dirite, valoro kaj prezo de la laboro estas sensencaj esprimoj.

Due. Kvankam nur parto de la taglaboro de la laboristo konsistas el pagata, la alia male el *nepagata* laboro kaj ĝuste tiu nepagata pluslaboro konsistigas la fonduson el kiu formiĝas la *plusvaloro* aŭ *profito*, estiĝas la ŝajno kvazaŭ la tuta laboro konsistus el pagata laboro.

Tiu trompa ŝajno estas la distinga trajto de la *salajrolaboro* kontraste al aliaj *historiaj* formoj de laboro. Surbaze de la salajrosistemo ankaŭ tiu *nepagata* laboro havas la ŝajnon esti *pagata*. Ĉe la *sklavo* male ankaŭ la pagata parto de lia laboro ŝajnas esti nepagata. Kompreneble la sklavo devas vivi por labori, kaj parto de lia labortago fariĝas kiel kompenso de la valoro konsumita por lia propra konservado. Sed ĉar inter li kaj lia mastro ne estas farita ia kontrakto kaj ĉar inter ambaŭ partoj ne okazas vendaj aŭ aĉetaj agoj, tial ĉiu lia laboro ŝajnas esti senpaga laboro.

Prenu aliflanke la servutan kampulon, kiel li ekzistis, kvazaŭ hieraŭ, ankoraŭ en la tuta oriento de Eŭropo. Tiu terkulturisto laboris ekz-e 3 tagojn por si sur sia propra aŭ al li asignita kampo, kaj la tri sekvajn tagojn li plen

umis devige senpagan laboron sur la mastra bieno. Tie do la pagata kaj la nepagata partoj de la laboro estis videble disigitaj, tempe kaj space disigitaj; kaj niaj liberaluloj elverŝis sian moralan indignon vide al la absurda ideo laborigi homon senpage.

Sed fakte restas same, ĉu iu laboras dum 3 tagoj semajne por si sur sia propra kampo kaj 3 tagojn senpage sur la mastra bieno, aŭ ĉu li laboras 6 horojn tage en la fabriko aŭ metiejo por si kaj 6 horojn por la salajra mastro, kvankam en tiu kazo la pagata kaj nepagata partoj de lia laboro estas nemalimplikeble kunmiksitaj, tiel ke la naturo de la tuta transakcio per la *interveno de kontrakto* kaj per la semajnfine plenumata *pago* estas komplete vualita. La senpaga laboro aperas en unu kazo kiel libervola donaco kaj en la alia kiel servuto. Jen la tuta diferenco.

Kie mi do uzas la vorton "*valoro de la laboro*", mi nun uzos ĝin kiel kutiman vulgaresprimon por "*valoro de la laborforto*".

10. Profito fariĝas per vendo de varo je ĝia valoro

Supozate, ke mezuma laborhoru estas konkretigita en valoro egala al 6, aŭ 12 mezumaj laborhoruj en 12 ŝ. Supozate krome, ke la valoro de la laboro estu 3 ŝ aŭ la produkto de seshora laboro. Se nun en krudmaterialo, maŝinaro ktp., kiuj estis konsumitaj ĉe produktado de varo, 24 mezumaj laborhoruj estas konkretigitaj, tiam ĝia valoro estus 12 ŝ. Se krome la laboristo dungita de la kapitalisto aldonus al tiuj produktrimedoj 12 laborhorujn, tiam tiuj 12 horuj estus konkretigitaj en aldona valoro de 6 ŝ. La *entuta valoro de la produkto* estus do 36 horuj da konkretigita laboro kaj estus egala al 18 ŝ. Sed ĉar la valoro de la laboro aŭ la salajro pagata al la laboristo estus nur 3 ŝ, la kapitalisto ne pagus ekvivalenton por 6 horuj da pluslaboro farita de la laboristo kaj konkretigita en la valoro de la varo. Se la kapitalisto vendus tiun varon je ĝia valoro de 18 ŝ, li realigus valoron de 3 ŝ, por kiu li ne pagis ekvivalenton. Tiuj 3 ŝ konsistigus la plusvaloron aŭ profiton, kiun li enpoŝigas. La kapitalisto realigus do la profiton de 3 ŝ ne per tio ke li vendas la varon je prezo *super* ĝia valoro, sed per tio, ke li vendas ĝin *je ĝia reala valoro*.

La valoro de varo estas difinita per la *totala laborkvanto* entenata en ĝi. Sed parto de tiu laborkvanto estas konkretigita en valoro, por kiu en formo de salajro estis pagita ekvivalento, kaj parto en valoro, por kiu estis pagita *nenia* ekvivalento. Parto de la laboro entenata en la varo estas *pagita* laboro, parto estas *nepagita* laboro. Se la kapitalisto do vendas la varon *je ĝia valoro*, do kiel kristaliĝon de la *totala laborkvanto* aplikita al ĝi, li devas vendi ĝin nepre kun profito. Li vendas ne nur tion kio kostis al li ekvivalenton, li vendas ankaŭ tion kio kostis al li neniom, kvankam ĝi kostis la laboron de lia laboristo. La kostoj de la varo por la kapitalisto kaj ĝiaj realaj kostoj estas du diversaj aferoj. Mi ripetas do, ke normalaj kaj mezumaj profitoj fariĝas per vendo de la varoj ne *super*, sed *je iliaj realaj valoroj*.

11. La diversaj partoj en kiuj dividiĝas la plusvaloro

La *plusvaloron* aŭ la parton de la totala valoro de la varo, en kiu la *pluslaboro* aŭ *nepagita laboro* de la laboristo estas konkretigita, mi nomas *profiton*. Ne estas la totala sumo de tiu profito kiun enpoŝigas la industria kapitalisto. La grundmonopolo kapabligas la grundproprietulon tiri al si parton de tiu *plusvaloro* sub la nomo de *rento*, ĉu per tio ke la grundo estas uzata por terkulturado aŭ konstruaĵoj aŭ fervojoj, ĉu per tio ke ĝi estas uzata por ia ajn alia celo. Aliflanke, ĝuste la fakto, ke la posedo de la *laborrimedoj* kapabligas la industrian kapitaliston produkti *plusvaloron*, aŭ, kio signifas la samon, *alproprigi al si certan kvanton da nepagata laboro*, kapabligas la proprietulon de la laborrimedoj, kiujn li tute aŭ parte pruntas al la industria kapitalisto - kapabligas, unuvorte, la *monalpruntan kapitaliston*, alproprigi al si alian parton de tiu plusvaloro sub la nomo interezo, tiel ke restas al la industria kapitalisto *kiel tia* nur tio kion oni nomas *industria* aŭ *komerca profito*.

Kiuj leĝoj reguligas tiun disdividon de la totala kvanto de la plusvaloro por la tri homkategorioj, tio estas demando kiu tute foras de nia temo. Tamen, la jeno rezultiĝas el la ĝisnuna argumentado.

Rento, interezo kaj industria profito estas nur *diversaj nomoj por diversaj partoj de la plusvaloro de la varo* aŭ de la *en ĝi konkretiĝinta nepagita laboro* kaj *devenas sammaniere el tiu fonto kaj nur el ĝi*. Ili devenas ne el la grundo kiel tia aŭ el la *kapitalo* kiel tia, sed grundo kaj kapitalo kapabligas siajn proprietulojn akiri siajn respektivajn partojn de la plusvaloro elpremita de la industria kapitalisto el lia laboristo. Por la laboristo mem estas afero de suborda graveco ĉu tiu plusvaloro, kiu estas la rezulto de lia pluslaboro aŭ nepagita laboro, estas tute enpoŝigita de la industria kapitalisto aŭ ĉu tiu devas plupagi partojn da ĝi sub la nomo rento kaj interezo al triaj personoj. Se ni supozas ke la industria kapitalisto aplikas nur sian propran kapitalon kaj estas sia propra grundproprietulo, tiukaze la tuta plusvaloro migras en lian poŝon.

Estas la industria kapitalisto, kiu rekte elpremas plusvaloron el la laboris

to, sendepende de tio, kiun parton li kapablas fine reteni por si. Ĉirkaŭ tiu rilato inter industria kapitalisto kaj salajrolaboristo sekve turniĝas la tuta salajrosistemo kaj la tuta nuntempa produktad-sistemo. Kelkaj civitanoj, kiuj partoprenis nian debaton, do malpravus provante beligi la aferon kaj pritrakti tiun fundamentan rilaton inter industria kapitalisto kaj laboristo kiel duarangigandemandon, kvankam ili pravus pri la konstato, ke sub donitaj cirkonstancoj kresko de la prezoj tuŝas en tre malsamaj gradoj la industriajn kapitalistojn, la grundproprietulojn, la monkapitalistojn kaj, se vi volas, la impostkolektistojn.

El la ĝisnuna dirito sekvas nun ankoraŭ io alia.

La parto de la varvaloro, kiu reprezentas nur la valoron de la krudmaterialoj, de la maŝinaro, mallonge la valoron de la konsumitaj produktrimedoj, tute *ne estigas enspezon*, sed anstataŭas *nur kapitalon*. Sed sendepende de tio, estas malĝuste [diri], ke la alia parto de la varvaloro, kiu *estigas enspezon* aŭ elspezeblas en formo de salajro, profito, rento, interezo, *konsistigas sin* el la valoro de la salajro, la valoro de la rento, la valoro de la profito ktp. Ni volas unue preterlasi la salajron kaj pritrakti nur la industriajn profitojn, interezojn kaj rentojn. Ni vidis ĵus, ke la *plusvaloro* entenata en la varo, aŭ la parto de ĝia valoro, en kiu *nepagata laboro* konkretiĝis, *dissolviĝas* en diversaj partoj kun tri diversaj nomoj. Sed estus turni la veron en sian malon, se oni volus diri ke ĝia valoro *konsistas el la memstaraj valoroj de tiuj tri partoj* aŭ ke ĝi *formiĝas el ilia adicio*.

Se laborhoroj konkretiĝas en valoro de 6 d, se la labortago de la laboristo estas 12 horoj, se la duono de tiu tempo konsistas el nepagata laboro, tiu *pluslaboro* aldonas al la varo plusvaloron de 3 ŝ, do valoron por kiu ne estas pagita ekvivalento. Tiu plusvaloro de 3 ŝ konsistigas la tutan fonduson, kiun la industria kapitalisto povas dividi kun la grundproprietulo kaj la monpruntisto, en kia ajn proporcio. La valoro de tiuj 3 ŝ konsistigas la limon de la valoro kiun ili povas dividi inter si. Sed ne estas la industria kapitalisto kiu aldonas al la varvaloro arbitran valoron cele al sia profito, al kiu aldoniĝas kroma valoro por la grundproprietulo ktp., tiel ke la adicio de tiuj tri arbitre difinitaj valoroj konsistigus la totalan valoron. Vi vidas do la trompecon de la kutima ideo, kiu konfuzas la *fendon* de *donita valoro* en tri partojn kun la

formado de tiu valoro per adiciado de tri *memstaraj* valoroj, per kio ĝi transformas la totalan valoron, el kiu rento, profito kaj interezo devenas, en arbitran grandon.

Se la totala profito realigita de kapitalisto egalas al 100 stp, tiam ni nomas tiun sumon, konsideratan kiel *absolutan* grandon, la kvanton de *profito*. Sed se ni kalkulas la rilaton, en kiu tiuj 100 stp troviĝas kun la antaŭpagita kapitalo, ni nomas tiun *relativan* grandon la *kvoto de la profito*. Evidentas, ke tiu profitkvoto esprimeblas dumaniere.

Supozate, ke 100 stp estas kapitalo *antaŭpagita en salajro*. Se la produktita plusvaloro estas ankaŭ 100 stp - kio montras al ni ke la duona labortago de la laboristo konsistas el *nepagata* laboro - kaj mezuras tiun profiton laŭ la kapitalo antaŭpagita por salajro, ni dirus, ke la *profitkvoto* estas je 100 %, ĉar la antaŭpagita valoro 100 kaj la realigita valoro estus 200.

Se ni aliflanke rigardas ne nur la *kapitalon antaŭpagitan por salajro*, sed la antaŭpagitan totalokapitalon, ekz-e 500 sterlingajn pundojn, el kiuj 400 stp reprezentas la valoron de la krudmaterialoj, maŝinaro ktp., ni dirus, ke la *profitkvoto* estas nur je 20 %, ĉar la profito de 100 estus ne pli ol la kvinono de la antaŭpagita *totala* kapitalo.

La unua esprimiĝa formo de la profitkvoto estas la sola kiu montras al vi la realan rilaton inter pagata kaj nepagata laboro, la realan gradon de la *Exploitation* (vi devas permesi al mi tiun francan vorton) *de la laboro*. La alia esprimiĝa formo estas la ĝenerale kutima, kaj efektive ĝi estas taŭga por certaj celoj. Ĉiukaze ĝi estas tre utila por vualii la gradon, en kiu la kapitalisto elpremas senpagan laboron el la laboristo.

En la rimarkoj kiujn mi estas ankoraŭ faronta mi uzos la vorton *profito* por la totala kvanto de la plusvaloro elpremata de la kapitalisto sen konsidero al la disdivido de tiu plusvaloro inter la diversaj personoj, kaj kie mi uzas la vorton *profitkvoto*, mi mezuros la profiton laŭ la valoro de la kapitalo antaŭpagita por salajro.

12. La ĝenerala rilato inter profitoj, salajroj kaj prezoj

Se oni deprenas de la valoro de varo tiun valoron kiu estas anstataŭo por la en ĝi entenata valoro de la krudmaterialoj kaj aliaj produktrimedoj, do la valoron de la en ĝi entenata *pasinta* laboro, tiam la resto de ĝia valoro dis-solviĝas en la laborkvanto, kiun la *laste* dungita laboristo aldonis al ĝi. Se tiu laboristo laboras 12 horojn tage, se 12 horoj da mezuma laboro kristaliĝas en orkvanto egala al 6 ŝ, tiu aldonita valoro de 6 ŝ estos la *sola* valoro kiun kreis lia laboro. Tiu donita, per lia labortempo difinita valoro estas la sola fonduso, el kiu ambaŭ, li kaj la kapitalisto, povas tiri siajn respektivajn partojn aŭ dividendojn, la sola valoro dividebla en salajro kaj profito. Estas klare, ke tiu valoro mem ne ŝanĝeblas per la variaj porcioj, en kiujn ĝi divideblas inter la du partioj. Ĉe tio ankaŭ nenio ŝanĝiĝus, se oni supozas, anstataŭ unu solan laboriston, la tutan laboristaron, 12 milionojn da labortagoj ekz-e anstataŭ unu solan.

Ĉar kapitalisto kaj laboristo havas nur tiun limigitan valoron por dividi, do la valoron mezuratan laŭ la entuta laboro de la laboristo, tial la unua ricevas des pli, ju malpli ricevas la alia, kaj inverse. Ekde kiam kvanto estas donita, unu parto de ĝi pliiĝos, kiel inverse la alia malpliiĝas. Se la salajro ŝanĝiĝas, la profito ŝanĝiĝas en la kontraŭa direkto. Se la salajro falas, kreskas la profito; kaj se la salajro kreskas, falas la profito. Se la laboristo laŭ nia antaŭa supozo ricevus 3 ŝ egalajn al la duono de la valoro kreita de li aŭ lia tuta labortago konsistus duone el pagata, duone el nepagata laboro, tiam la *profitkvoto* estus 100 %, ĉar la kapitalisto ricevus ankaŭ 3 ŝ. Se la laboristo ricevus nur 2 ŝ aŭ laborus nur trionon de la tuta tago por si, tiam la kapitalisto ricevus 4 ŝ, kaj lia profitkvoto estus 200 %. Se la laboristo ricevus 4 ŝ, tiam la kapitalisto ricevus nur 2, kaj la profitkvoto falus al 50 %, sed ĉiuj ĉi ŝanĝoj ne tuŝus la valoron de la varo. Ĝenerala salajroaltiĝo do signifus ĝenerlan malaltiĝon de la profitkvoto, sed sen influi la valorojn.

Sed kvankam la valoroj de la varoj, kiuj lastinstance devas reguligi iliajn merkaptoprezojn, estas ekskluzive difinataj per la totalkvantoj de la en ili prezentata laboro kaj ne per la divido de tiu kvanto en pagatan kaj nepagatan laboron, el tio tute ne sekvas, ke la valoroj de la opaj varoj aŭ varkvantoj,

kiuj estas ekz-e en 12 horoj produktitaj, restas konstantaj. La *nombro* aŭ kvanto da varoj produktitaj en donita labortempo aŭ per donita laborkvanto dependas de la produktivo de la aplikita laboro kaj ne de ĝia daŭro aŭ longeco. Per la grado da produktivo de la ŝpinlaboro ekz-e labortago de 12 horoj povus produkti 12 pundojn da fadeno, per malpli alta grado nur 2 pundojn. Se dekdu-hora mezuma laboro konkretiĝas en la unua kazo en valoron de 6 ŝ, la 12 pundoj da fadeno kostus 6 ŝ, en la alia kazo la 2pundoj da fadeno ankaŭ 6 ŝ. Unu pundo da fadeno kostus do en la unua kazo 6 d, en la alia 3 ŝ. Tiu prezidiferenco rezultiĝas el la diferenco de la produktivoj de la aplikata laboro. Per la pli granda produktivo en 1 pundo da fadeno estus 1 laborhoru konkretigita, sed per la pli malalta 6 laborhoroj. La prezo de 1 pundo da fadeno estus en la unua kazo nur 6 d, kvankam la salajro estus relative alta kaj la profitkvoto malalta; en la alia kazo ĝi estus 3 ŝ., kvankam la salajro estus malalta kaj la profitkvoto alta. Tio estus la kazo, ĉar la prezo de la pundo da fadeno estas reguligata per la *totala kvanto de la en ĝi enlaborita laboro* kaj ne per la *proporcia divido de tiu totala kvanto en pagata kaj nepagata laboro*. La fakto menciita de mi antaŭe, ke alte pagata laboro povas produkti malkarajn kaj malalte pagata laboro karajn varojn, pro tio perdas sian paradoksan ŝajnon. Ĝi esta nur la esprimo de la ĝenerala leĝo, ke la valoro de varo estas reguligata de la en ĝi enlaborita laborkvanto, sed ke la en ĝi enlaborita laborkvanto tute dependas de la produktivo de la aplikita laboro kaj pro tio ŝanĝiĝas kun ĉiu ŝanĝo en la produktivo de la laboro.

13. La precipaj provoj altigi la salajron aŭ kontraŭagi ties falon

Ni rigardu nun la ĉefajn kazojn unu post la alia, en kiu altigo de la salajro estas provata aŭ ĝia malaltigo estas kontraŭagata.

1. Ni vidis, ke la *valoro de la laborforto*, aŭ en la pli kutima parolmaniero: la *valoro de la laboro*, estas difinata per la valoro de la vivrimedoj aŭ la por ilia produktado necesa laborkvanto. Se nun en donita lando la mezuma valoro de la ĉiutagaj vivrimedoj de laboristo reprezentus 6 laborhorojn, kiuj esprimiĝus en 3 ŝ, tiam la laboristo devus labori 6 horojn tage por produkti ekvivalenton por sia ĉiutaga vivtenado. Se la tuta labortago estus 12 horoj, tiam la kapitalisto pagus al li la valoron de lia laboro pagante al li 3 ŝ. La duona labortago konsistus el nepagata laboro kaj la profitkvoto estus 100 %. Sed supozate nun ke sekve al malaltiĝo de la produktivo necesus pli da laboro por produkti ekz-e la saman kvanton da kampkulturaj produktoj, tiel ke la mezuma prezo de la ĉiutagaj vivrimedoj altiĝus de 3 al 4 ŝ. Tiukaze la *valoro* de la laboro altiĝus je triono aŭ 33,5 %. Ok horoj de la labortago necesus por produkti ekvivalenton por la ĉiutaga vivtenado de la laboristo laŭ lia malnova vivnivelo. Pro tio, la pluslaboro falus de 6 al 4 horoj kaj la profitkvoto de 100 al 50 %. Sed se la laboristo insistus pri altigo de lia salajro, li insistus nur konservi la *kreskintan valoron de sia laboro*, precize kiel ĉiu alia vendisto de varo, kiu, ekde kiam la kostoj de lia varo kreskis, provas ricevi la pagon por la kreskinta valoro. Se la salajro tute ne altiĝus aŭ ne sufiĉe por kompensi la kreskintajn valorojn de la vivrimedoj, tiam la *prezo* de la laboro falus sub la *valoron de la laboro* kaj la vivnivelo de la laboristo malboniĝus.

Sed ŝanĝo povus okazi ankaŭ en inversa direkto. Sekve al la pli alta produktivo de la laboro la sama mezuma kvanto da ĉiutagaj vivrimedoj povus fali de 3 al 2 ŝ, aŭ necesus nur 4 anstataŭ 6 horoj de la labortago por la reproduktado de ekvivalento por la valoro de la ĉiutagaj vivrimedoj. La laboristo estus nun kapabligita aĉeti per 2 ŝ same multajn vivrimedojn kiel antaŭe per 3 ŝ. Efektive la *valoro de la laboro* estus malaltiĝinta, sed tiu malaltiĝinta valoro komandus la saman kvanton de vivrimedoj kiel antaŭe. Tiam la

profito altiĝus de 3 al 4ŝ kaj la profitkvoto de 100 al 200%. Kvankam la absoluta vivnivelo de la laboristo restus la sama, lia *relativa* salajro kaj per tio lia *relativa socia pozicio*, kompare kun tiu de la kapitalisto, estus malaltiĝinta. Se la laboristo rezistus al tiu malaltigo de la relativa salajro, tio estus nur provo certigi al si certan parton de la altiĝo de la produktivo de sia propra laboro kaj defendi sian antaŭan relativan pozicion en la socia skalo. Tiel la anglaj fabrikmastroj, post abolo de la grenleĝoj, kaj kun evidenta rompo de la dum la agitado kontraŭ la grenleĝo plej ceremonie donitaj promesoj, reduktis la salajron ĝenerale je 10%. La rezistado de la laboristoj estis komence superita, sed sekve al cirkonstancoj, kiujn mi nun ne povas mencii, la perditaj 10% estis poste reakiritaj.

2. La *valoro* de la vivrimedoj, kaj pro tio la *valoro* de la *laboro*, povus resti la sama, sed ĝia *monprezo* povus sekve al antaŭa *ŝanĝo* de la *monvaloro* sperti ŝanĝon.

Post malkovro de riĉaj minejoj ktp. la produktado de du uncoj da oro ne devus kosti pli da laboro ol antaŭe la produktado de unu unco. La *valoro* de la oro tiam malaltiĝintus je duono aŭ 50%. Ĉar la *valoroj* de ĉiuj aliaj varoj, esprimitaj en siaj antaŭaj *monprezoj*, estus duobliĝintaj, tiel ankaŭ la *valoro de la laboro*. Dek-du laborhoroj, antaŭe esprimitaj per 6 ŝ, esprimiĝus nun per 12 ŝ. Se la salajro de la laboristo, anstataŭ kreski al 6 ŝ, restus 3 ŝ, tiam la *monprezo de lia laboro* estus nur egala al la *duona valoro de lia laboro*, kaj lia vivnivelo terure malboniĝus. Tio okazus en pli aŭ malpli alta grado ankaŭ tiam, se lia salajro ja altiĝus, sed ne en proporcio al malkresko de la orvaloro. Tiukaze nenio ŝanĝiĝintus, nek la produktivo de la laboro nek la propono kaj postulo, nek la valoroj. Nenio ŝanĝiĝintus krom la *monnomoj* de tiuj valoroj. Se oni diras, ke la laboristo tiukaze ne insistu pri proporcia salajroaltigo, tio signifas, ke li kontentiĝu esti pagata per nomoj anstataŭ per aĵoj. Ĉia ĝisnuna historio pruvas, ke, kiam ajn okazas tia senvaloriĝo de la mono, la kapitalistoj ne preterlasas tiun okazon por trompi la laboriston. Tre multnombra skolo de politikaj ekonomikistoj asertas, ke sekve al malkovro de novaj orkampoj, al pli bona ekspluatado de la arĝentminejoj kaj al pli malkara provizo de hidrargo la valoro de la noblaj metaloj refalis. Tio klarigus, kial sur la kontinento oni faras ĝenerale kaj samtempe provojn trudi altigon de la salajroj.

3. Ĝis nun ni supozis la limojn de la *labortago* kiel donitaj. Sed la labor-tago per si mem ne havas konstantajn limojn. La kapitalo konstante tendencas etendi ĝin ĝis la plej ekstrema korpe ebla daŭro, ĉar sammezure pliiĝas la pluslaboro kaj sekve la el tiu rezultanta profito. Ju pli sukcese la kapitalo plilongigas la labortagon, des pli grandas la kvanto da fremda laboro kiun ĝi alproprigas. Dum la 17-a, kaj eĉ en la unuaj du trionoj de la 18-a jarcento dekhora labortago estis norma labortago en tuta Anglio. Dum la milito kontraŭ la jakobenoj, kiu en realo estis milito de la britaj baronoj kontraŭ la britaj laboristaj amasoj, la kapitalo festis siajn orgiojn kaj longigis la labortagon de 10 al 12, 14, 18 horoj. *Malthus*, kiun vi certe ne suspektas je plorema sentimentaleco, publikigis ĉirkaŭ 1815 pamfleton en kiu li deklaris, ke, se tiu stato daŭrus, la vivo de la nacio estus atakita rekte ĉe sia radiko. Kelkajn jarojn antaŭ la ĝenerala enkonduko de la nove malkovrita maŝinaro, ĉirkaŭ 1765, aperis en Anglio pamfleto sub la titolo "*An Essay on Trade*". La anonima aŭtoro, ĝisosta malamiko de la laborantaj klasoj, deklamas pri la neceso etendi la limojn de la labortago. Inter aliaj rimedoj por tiu celo li proponas *labordomojn*, kiuj devus, kiel li diras, esti "*domoj de teruro*". Kaj kia estas la daŭro de la labortago, kiun li preskribas por tiuj "*domoj de teruro*"? *Dek-du horoj*, precize la sama tempo, kiun 1832 kapitalistoj, politikaj ekonomikistoj kaj ministroj deklaris ne nur kiel ekzistantan, sed kiel necesan labortempon de infano sub 12 jaroj.

La laboristo, vendante sian laborforton, kaj sub la nuna sistemo li devas fari tion, disponigas al la kapitalisto la konsumadon de tiu forto, sed ene de certaj raciaj limoj. Li vendas sian laborforton por konservi ĝin, aparte de ĝia natura eluzo, sed ne por detrui ĝin. Vendante sian laborforton je ĝia taga aŭ semajna valoro, oni konsideras kiel memkompreneble ke tiu laborforto en unu tago aŭ unu semajno ne estu submetata al dutaga aŭ dusemajna eluzo. Prenu maŝinon kiu valoras 1.000 sterlingajn pundojn. Se ĝi estas eluzita en 10 jaroj, ĝi aldonas al la valoro de la varoj, en kies produktado ĝi partoprenas, jare po 100 sterlingajn pundojn. Se ĝi estus eluzita en 5 jaroj, tiam ĝi aldonus jare po 200 sterlingajn pundojn, aŭ la valoro de ĝia jara eluzo staras en reciproka rilato kun la tempodaŭro, en kiu ĝi estas konsumata. Sed tio distingas la laboriston disde la maŝino. La maŝino ne eluziĝas tute en la sama proporcio en kiu ĝi estas uzata. La homo, male, ruiniĝas en pli forta proporcio ol videblus en la nura nombra kunkalkulado de la plenumita laboro.

Ĉe siaj provoj redukti la labortagon al ĝiaj antaŭaj raciaj dimensioj aŭ, kie ili ne povas trudi la leĝan difinon de normala labortago, bridi la kromlaboron per altigo de la salajro, altigo ne nur proporcie al la postulata kromtempo, sed en pli granda proporcio, la laboristoj plenumas nur devon al si mem kaj al sia idaro. Ili nur remetis la kapitalon kun ĝiaj tiranaj eksceso en ĝian lokon. Tempo estas la spaco por homa disvolviĝo. Homo kiu ne disponas pri libera tempo, kies tuta vivtempo - aparte de pure korpaj interrompoj per dormo, manĝoj ktp. - estas forglutata de la kapitalisto, estas malpli ol ŝarĝobesto. Li estas nura maŝino por produkti fremdan riĉaĵon, korpe rompita kaj spirite brutaliĝinta. Tamen la tuta historio de la moderna industrio montras, ke la kapitalo, se oni ne haltigas ĝin, avidas senindulge kaj senkompatate puŝi la tutan laboristan klason en tiun staton de ekstrema malnobligo.

Ĉe longigo de la labortago la kapitalisto povas pagi *pli altan salajron* kaj tamen malaltigi la *valoron de la laboro*, kaze ke la salajro-altigo ne estas proporcia al la elpremata pli granda laborkvanto kaj al la tiel efektivigata pli rapida ruinigo de la laborforto. Tio povas okazi ankaŭ alie. Viaj burĝaj statistikistoj ekz-e klarigos al vi, ke la mezuma salajro de la fabriklaboristaj familioj en Lancashire kreskis. Ili forgesas, ke anstataŭ la laboro de la edzo, de la famili-ĉefo, nun lia edzino kaj eble tri aŭ kvar infanoj estas ĵetitaj sub la frakasantajn radojn de la kapitalo kaj ke la altiĝo de la tutaĵo de la salajro tute ne proporcias al la tutaĵo de la pluslaboro, kiu estas elpremata el la familio.

Eĉ ĉe donitaj limoj de la labortago, kiuj ekzistas nun en ĉiuj industribranĉoj submetitaj al la fabrikleĝoj, salajroaltigo povas fariĝi necesa, jam por konservi la malnovan norman *valoron de la laboro*. Per altigo de la *intenseco* de la laboro homo povas esti kondukita al elspezi en unu horo tiom da vivoforto kiel antaŭe en du. Tio okazis en la komercaj branĉoj, kiuj estis submetitaj al la fabrikleĝaro, certgrade per plirapidigo de la maŝinaro kaj pliigo de la nombro da labormaŝinoj, kiujn unuopulo nun devas superrigardi. Se la pliigo de la laborintenso aŭ de la laborkvanto elspezita en unu horo estas iel proporcia al la mallongigo de la labortago, tiam la laboristo troviĝas ankoraŭ en avantaĝo. Trans tiu limo li perdas en unu formo kiun li gajnis en la alia, kaj 10 laborhoroj povas tiam esti same ruinigaj kiel antaŭe 12 horoj. Se la laboristo kontraŭagas tiun tendencon de la kapitalo, batalante

por salajroaltigo proporcia al la kreskanta laborintenseco, tiam li nur kontraŭagas la senvalorigon de lia laboro kaj la malfortigon de lia idaro.

4. Vi ĉiuj scias, ke la kapitalisma produktado, pro kialoj kiujn mi nun ne bezonas detaligi, moviĝas en certaj periodaj cikloj. Ĝi spertas unu post la alia la stacion de trankvilo, de kreskanta vigliĝo, prospero, superproduktado, krizo kaj stagnado. La merkatprezoj de la varoj kaj la merkatkvotoj de la profito sekvas tiujn fazojn, foje falante sub sian mezumon, foje leviĝante super ĝin. Se vi rigardas la tutan ciklon, vi trovas, ke unu devojiĝo de la merkatprezo estas kompensata de la alia kaj ke, konsiderate la mezumon de la ciklo, la merkatprezoj de la varoj estas reguligataj de iliaj valoroj. Bone! Dum la fazo de falantaj merkatprezoj, same kiel dum la fazoj de krizo kaj de stagnado, la laboristo, se li ne estas ĵetita sur la pavimon, atendas malaltiĝon de sia salajro. Por ne esti trompita, li devas, eĉ dum tia falo de la merkatprezoj, marĉandi kun la kapitalisto pri tio, en kiu proporcia mezuro salajromalaltiĝo fariĝis necesa. Se li ne batalis jam en la prospero-fazo, dum fariĝis kromprofitoj, por salajro-altigo, li atingus en la mezumo de industria ciklo eĉ ne sian *mezuman salajron* aŭ la *valoron* de sia laboro. Estas la pinto de absurdo postuli, ke, dum lia salajro nepre suferis pro la malfavoraj fazoj de la ciklo, li rezignu kompensi tion dum la prospero-fazo. Ĝenerale dirite: La *valoroj* de ĉiuj varoj estas realigataj nur per kompensado de la konstante ŝanĝiĝantaj merkatprezoj, kiuj fontas el la konstantaj fluktuadoj de postulo kaj propono. Surbaze de la nuan sistemo, la laboro estas nur varo kiel la aliaj. Ĝi devas do sperti la samajn fluktuadojn por atingi mezuman prezon proporcian al ĝia valoro. Estus absurde trakti ĝin unuflanke kiel varon kaj aliflanke postuli ke ĝi estu esceptigita el la leĝoj reguligantaj la varprezojn. La sklavo ricevas konstantan kaj fiksan kvanton por vivtenado; la salajro-laboristo ne ricevas ĝin. Li devas provi certigi al si en la unua kazo salajroaltigon, jam por en la alia kazo esti almenaŭ kompensata por la salajro-malaltiĝo. Se li volus kontentigi sin silente suferi la volon, la potencpretendojn de la kapitalisto kiel konstantan ekonomian leĝon, tiam li ricevus la sorton de ĉia mizero de la sklavo sen la sekuran ekzistadon de la sklavo.

5. En ĉiuj kazoj, kiujn mi prikonsideris - kaj ili estas 99 elcentoj -, vi vidis, ke luktado por salajroaltigo okazas nur kiel postludo de *antaŭaj* ŝanĝoj kaj estas la nepra rezulto de antaŭaj ŝanĝoj de amplekso de produktado, de

la produktivo de la laboro, de la valoro de la laboro, de la valoro de mono, de la daŭro aŭ intenseco de la elpremata laboro, de la fluktuadoj de la merkatoj, depende de la fluktuadoj de postulo kaj propono kaj kongrue kun la diversaj fazoj de la industria ciklo - mallonge, kiel defend-reago de la laboro kontraŭ la antaŭa ago de la kapitalo. Se vi konsideras la luktadon por salajro-altigo sendepende de ĉiuj ĉi cirkonstancoj, se vi atentis nur la salajro-ŝanĝojn kaj preteratentis ĉiujn aliajn ŝanĝojn el kiuj ili fontas, vi eliras el malĝusta premiso por veni al malĝustaj konkludoj.

14. La batalo inter kapitalo kaj laboro kaj ĝiaj rezultoj

1. Post kiam ni montris, ke la perioda rezistado de la laboristoj kontraŭ salajro-malaltigo kaj iliaj periode ripetiĝantaj provoj trudi salajro-altigon, estas nedisigeblaj disde la salajrosistemo kaj estas nepra sekvo de ĝuste la fakto, ke la laboro estas metita en la kategorion de la varoj kaj pro tio submetita al la leĝoj kiuj reguligas ĝeneralan moviĝon de la prezoj; post kiam ni krome montris, ke ĝenerala salajro-altigo kaŭzus falon de la ĝenerala profitkvoto, sed ne influus la mezumajn prezojn de la varoj aŭ iliajn valorojn, leviĝas nun la demando, en kiu mezuro en tiu senĉesa luktado inter kapitalo kaj laboro tiu lasta povas esperi sukceson.

Mi povus respondi per ĝeneraligo kaj diri, ke kiel ĉe ĉiuj aliaj varoj tiel ankaŭ ĉe la laboro ĝia *merkaptoprezo* kun la tempo adaptiĝos al ĝia *valoro*; ke do la laboristo, kion ajn li faras, spite al ĉiaj moviĝoj supren kaj suben, mezume ricevas nur la valoron de sia laboro, kiu solviĝas en la valoro de lia laborforto, difinita per la valoro de la vivrimedoj necesaj por ĝia konservado kaj reproduktado, kies valoro estas lastinstance reguligata de la laborkvanto necesa por ĝia produktado.

Sed ekzistas certaj propraj trajtoj, kiuj distingas la *valoron de la laborforto* aŭ la *valoron de la laboro* antaŭ la valoro de ĉiuj aliaj varoj. La valoro de la laborforto estas formata el du elementoj: - pure korpa kaj historia aŭ socia. Ĝia *ekstrema limo* estas difinita de la *korpa* elemento, do por konservi kaj reprodukti sin, por certigi sian korpan ekzistadon por la daŭro, la laborista klaso devas ricevi la vivrimedojn nemalhaveblajn por sia vivo kaj generado. La *valoro* de tiuj nemalhaveblaj vivrimedoj formas do la ekstreman limon de la *valoron de la laboro*. Aliflanke la longeco de la labortago estas ankaŭ limigita per ekstremaj, kvankam tre elastaj baroj. Ĝia ekstrema limo estas donita kun la korpa forto de la laboristo. Se la ĉiutaga elĉerpiĝo de lia vivoforto transpaŝas certan gradon, ĝi ne povas ĉiam denove, tagon post tago, esti streĉata. Tamen, kiel dirite, tiu limo estas tre elasta. Rapida sekvo de malfortaj kaj mallonge vivantaj generacioj prizorgos la labormerkaton same bone kiel vico da robustaj kaj longe vivantaj generacioj.

Krome per tiu pure korpa elemento la valoro de la laboro estas en ĉiu lando difinita per *tradicia vivnivelo*⁶. Ĝi koncernas ne la pure korpan vivon, sed la kontentigon de certaj bezonoj, kiuj fontas el la sociaj kondiĉoj sub kiuj la homoj estas metitaj kaj sub kiuj ili elkreskas. La angla vivnivelo malsuprigeblas al la irlanda normo; la vivnivelo de germana terkulturisto al tiu de livlanda. Kiom gravan rolon tiurilate ludas la historia tradicio kaj socia kutimo, vi povas vidi el la verko pri la "*Overpopulation*" de s-ro *Thornton*, kie li pruvas, ke la mezuma salajro en diversaj terkulturaj distriktoj de Anglio montras ankoraŭ nuntempe pli aŭ malpli gravajn diferencojn laŭ la pli aŭ malpli favoraj cirkonstancoj, sub kiuj la distriktoj elvenis el la stato de servuto.

Tiu historia aŭ socia elemento, kiu eniras en la valoron de la laboro, povas esti fortigita aŭ malfortigita kaj eĉ tute estingita, tiel ke nenio restas ol la *korpa limo*. Dumtempe de la milito kontraŭ la jakobenoj - farita, kiel kutimis diri la olda George Rose, tiu nebonigebla profitanto de impostoj kaj sinekuroj, por protekti la konsolojn de nia sankta religio kontraŭ la atakoj de la francaj nekredantoj - la honoreblaj anglaj farmistoj, kiuj en unu el niaj antaŭaj kunvenoj estis tiom milde traktataj, premis la salajrojn de la terkulturistoj eĉ sub tiun *pure korpan minimumon*, sed igis pagi la reston necesan por la korpa daŭrigo de la specio per la *malriĉul-leĝoj*. Tio estis glora maniero transformi la salajrulon en sklavon kaj la fieran liberulon de Ŝekspiro en mizerulon⁷.

Se vi komparas la normajn salajrojn aŭ valorojn de la laboro en diversaj landoj kaj se vi komparas ilin en diversaj historiaj epokoj de la sama lando, vi trovos, ke la *valoro de la laboro* mem ne estas fiksa, sed varia grando, eĉ supozante la valorojn de ĉiuj aliaj varoj konstantaj.

Simila komparo montras, ke ne nur la *merkatoj de la profito*, sed ankaŭ ĝiaj mezumaj kvotoj ŝanĝiĝas.

Sed koncerne la *profitojn*, ne ekzistas leĝo kiu difinus ilian *minimumon*. Ni ne povas diri kio estus la ekstrema limo de ilia malkresko. Kaj kial ni ne povas trovi tiun limon? Ĉar ni, kvankam ni povas difini la *minimumon* de la salajroj, ne povas difini ilian *maksimumon*. Ni povas nur diri, ke kun donitaj

6Laŭvorte: vivnormo (germ. Lebensstandard) -vl

7Laŭvorte: paŭperon (de 'paŭperismo'). -vl

limoj de la labortago la *maksimumo de la profito* respondas al la eltenebla⁸ *minimumo de la salajro*; kaj ke kun donita salajro la *maksimumo de profito* respondas al tia longigo de la labortago kia estas eltenebla por la korpaj fortoj de la laboristo. La maksimumo de profito estas do limigita per la eltenebla minimumo de la salajro kaj la eltenebla maksimumo de la labortago. Estas klare, ke inter la du limoj de tiu *maksimuma profitkvoto* eblas senfina skalo de variaĵoj. La fiksado de ĝia fakta grado okazas nur per la senĉesa luktado inter kapitalo kaj laboro, per tio ke la kapitalisto konstante strebas redukti la salajron al ĝia eltenebla minimumo kaj etendi la labortagon ĝis ĝia eltenebla maksimumo, dum la laboristo konstante premas en la kontraŭan direkton.

La demando solviĝas en la demando pri la fortrilato de la batalantoj.

2. Koncerne la *limigon de la labortago*, en Anglio kiel en ĉiuj aliaj landoj, ĝi okazis neniam alie ol per *leĝa enmiksiĝo*. Sen la konstata premo de la laboristoj deekstere tiu enmiksiĝo estus neniam okazinta. Sed ĉiukaze la rezulto ne atingebliĝis per privata interkonsento inter laboristoj kaj kapitalistoj. Ĝuste tiu neceso de *ĝenerala politika agado* pravas, ke en sia pure ekonomia agado la kapitalo estas la pli forta parto.

Koncerne la *limojn de la valoro de la laboro*, ĝia fakta difino dependas ĉiam de propono kaj postulo, mi celas la postulon je laboro flanke de la kapitalo kaj la proponon de laboro fare de la laboristoj. En koloniaj landoj la leĝo de propono kaj postulo favoras la laboriston. Pro tio la relative alta viv-nivelo en Usono. La kapitalo povas tie fari ekstremajn klopodojn, ĝi ne povas malhelpi, ke la labormerkato estas konstante senhomigata per la konstanta transformiĝo de salajruloj en sendependajn, memmastrumantajn terkulturistojn. La laborado kiel salajrulo estas por tre granda parto de la usona popolo nur provotempo, pri kiu ili certas esti ĝin post pli aŭ malpli longa tempo pasigintaj. Por malhelpi tiun staton de la aferoj en la kolonioj, la patreca brita registaro adoptis por certa tempo tion kion oni nomas la moderna koloniigo-teorio, kiu konsistas en artefarita altigo de la kolonia grundo, por malhelpi la tro rapidan transformiĝon de la salajrulo en sendependan terkulturiston.

8 En la germ.: „*physisches*“ - same kiel en la sekvaj uzoj de „*eltenebla*“ en tiu ĉi alineo. -vI

Sed ni rigardu nun la malnovajn civilizitajn landojn, en kiuj la kapitalo dominas la tutan produkto-proceson. Prenu ekz-e la kreskon de la terkultivist-salajroj en Anglio de 1849 ĝis 1859. Kio estis ĝia sekvo? La farmistoj povis, kiel nia amiko Weston konsilintus al ili, altigi nek la valoron de la tritiko nek eĉ nur ĝiajn merkato-prezojn. Anstataŭe ili devis rezigne kontentiĝi pri ilia falo. Sed dum tiuj 11 jaroj ili enkondukis diversan maŝinaron, aplikis sciencajn metodojn, transformis parton de la kampoj en paŝtejojn, pliampleksigis la farmaĵojn kaj per tio la produkto-skalon, kaj ĉar ili per tiuj kaj aliaj metodoj malpliigis la postulon je laboro kaj plialtigis la produktivon, ili igis la kamparan loĝantaron ree relative superflua. Tio estas en delonge prilongataj landoj ĝenerale la metodo laŭ kiu okazas pli rapida aŭ pli malrapida reago de la kapitalo al salajro-altiĝo. Ricardo rimarkis ĝuste, ke la maŝinaro konkurencas konstante kun la laboro kaj ofte enkondukeblas nur kiam la prezo de la laboro atingis certan altecon, sed la apliko de maŝinoj estas nur unu el la multaj metodoj altigi la produktivon de la laboro. Precize la sama evoluo, kiu relative superfluigas la nelernitan laboron, simpligas aliflanke la lernitan laboron kaj senvolorigas ĝin.

La sama leĝo troviĝas ankoraŭ en alia formo. Kun la disvolvado de la labor-produktivo la akumuliĝo de la kapitalo rapidiĝas, eĉ spite al relative alta salajrokvoto. El tio oni povus konkludi, kiel efektive konkludis A. Smith, en kies tempo la moderna industrio estis ankoraŭ en sia infanaĝo, ke tiu pli rapida akumuliĝo de la kapitalo devus movi la pesiltason favore al la laboristo, per tio ke ĝi certigas al li kreskantan postulon je lia laboro. El la sama starpunkto nun multaj verkistoj miris pri tio, ke, dum la angla kapitalo en la lastaj dudek jaroj tiom pli rapide kreskis ol kreskis la angla loĝantaro, la salajro ne kreskis pli signife. Sed samtempe kun la progreso de la akumuliĝo okazas *progresanta ŝanĝo en la konsisto de la kapitalo*. La parto de la entuta kapitalo, kiu konsistas el fiksa kapitalo - maŝinaro, krudmaterialoj, produktiloj en ĉiaj penseblaj formoj -, kreskas pli forte, kompare kun la alia parto de la kapitalo, kiu elspeziĝas por salajro aŭ por aĉeto de laboro. Tiu leĝo estas konstatita pli aŭ malpli precize de Barton, Ricardo, Sismondi, profesoro Richard Jones, profesoro Ramsay, Cherbuliez kaj aliaj.

Se la proporcio de tiuj du elementoj de la kapitalo estis origine 1:1, ĝi fariĝas kun la progreso de la industrio 5:1 ktp. Se de entuta kapitalo de 600

estas elspezata por instrumentoj, krudmaterialoj ktp. 300, kaj 300 por salajro, tiam la entuta kapitalo bezonas nur esti duobligata por krei postulon je 600 laboristoj anstataŭ je 300. Ĉe kapitalo de 600, el kiu 500 estas elspezataj por maŝinaro, materialoj ktp. kaj nur 100 por salajro, la sama kapitalo devas kreski de 600 al 3.600 por krei postulon je 600 laboristoj kiel en la antaŭa kazo. En la progreso de la industrio la postulo je laboro do ne tenas la paŝon de la akumuliĝo de la kapitalo. Ĝi ja ankoraŭ kreskas, sed en konstante malpliiganta proporcio, kompare kun la pligrandiĝo de la kapitalo.

Tiuj malmultaj indikoj sufiĉu por montri, ke la tuta evoluo de la moderna industrio devas klini la pesiltason ĉiam pli favore al la kapitalisto kaj kontraŭ la laboriston kaj ke estas do la ĝenerala tendenco de la kapitalisma produktado ne altigi la mezuman salajronivelon, sed malaltigi ĝin aŭ premi la valoron de la laboro pli aŭ malpli ĝis ĝia *minimuma limo*. Ĉar la tendenco de la aferoj en tiu ĉi sistemo estas tia, ĉu tio signifas, ke la laborista klaso devas rezigni kaj forlasi siajn provojn kiom eble plej bone uzi la okazajn ŝancojn por provizora plibonigo de sia situacio? Se ĝi farus tion, ĝi estus degradota al sendistinga amaso da ruiniĝintaj povruloj kiujn jam neniu savo helpos. Mi kredas esti pruvinta, ke ĝiaj bataloj pri la salajronormo estas flankaj fenomenoj nedisigeblaj de la tuta salajrosistemo, ke en 99 kazoj el 100 ĝiaj klopodoj altigi la salajron estas nur klopodoj por konservi la donitan valoron de la laboro kaj ke la neceso marĉandi kun la kapitalisto pri ĝia prezo estas imanenta al la kondiĉo devi proponi sin mem por aĉeto kiel varon. Se ili en siaj ĉiutagaj kunpuŝiĝoj kun la kapitalo malkuraĝe cedus, ili senmanke senigus sin je sia kapablo organizi ajnan ampleksan movadon.

Samtempe kaj tute sendepende de la ĝenerala servuto, kiu enkludas la salajrosistemon, la laborista klaso ne trotaksu la finfinan efikecon de tiu ĉiutagaj bataloj. Ĝi ne forgesu, ke ĝi batalas kontraŭ efikoj, sed ne kontraŭ la kaŭzoj de tiuj efikoj, ke ĝi ja malrapidigas la malsupriĝon, sed ne ŝanĝas ties direkton; ke ĝi uzas paliativojn, kiuj ne kuracas la malsanon. Ĝi do ne senescepte konsumiĝu en tiu neevitebla militeto, kiu senĉese fontas el la malĉesemaj perfortaĵoj de la kapitalo aŭ el la merkataj fluktuadoj. Ĝi komprenu, ke la nuna sistemo, kun ĉia mizero kiun ĝi alportas al ĝi, samtempe gravedas je la *materialaj kondiĉoj* kaj la sociaj formoj necesaj por ekonomia transformo de la socio. Anstataŭ la konservativan moton: "*Justan tagsalaj-*

ron por justa taglaboro", ĝi skribu sur sian standardon la revolucionian devizon: "For la salajrosistemon!"

Post tiu tre longa kaj, kiel mi timas, laciga argumentado, kiun mi devis fari por almenaŭ iom kontentige trakti la temon de la debato, mi ŝatus fini kun la propono akcepti jenajn decidojn:

1. Ĝenerala altigo de la salajrovoto kaŭzus malaltiĝon de la ĝenerala profitkvoto, sed sen, ĝenerale parolate, influi la varprezojn.

2. La ĝenerala tendenco de la kapitalisma produktado estas, ne altigi la mezuman salajronormon, sed malaltigi ĝin.

3. Sindikatoj faras bonajn servojn kiel kolektiĝejoj de la rezistado kontraŭ la perfortaĵoj de la kapitalo. Ili maltrafas sian celon parte, kiam ili faras pretercelan uzon de sia povo. Ili maltrafas sian celon komplete, se ili limigas sin al militeto kontraŭ la efikoj de la ekzistanta sistemo, anstataŭ samtempe provi ĝin ŝanĝi, anstataŭ uzi siajn organizitajn fortojn kiel levilon por la fina liberigo de la laborista klaso, do por la definitiva abolo de la salajrosistemo.

Postparolo de la tradukinto

Kial legi prelegon faritan antaŭ 142 jaroj? Ĉu ni ne disponas pri aktualaj klarigoj pri tio kio okazas en la ekonomia mondo?

Jes, ekzistas plej diversaj aliroj al la problemoj de nia epoko, ekzemple la sistemkritikoj el ekologia vidpunkto, la diversaj alimondismaj movadoj kun siaj teoriaj diskutoj. Sed la verkaro de Markso kaj Engelso havas la meriton analizi la tiam ekzistantan socion laŭ ĝia baza funkciado, la kapitalisma produktmaniero, kun ĉiaj implicaĵoj, jam en la *Manifesto de la Komunista Partio*, en la jaro 1848, kiu priskribas eĉ pli bone nian aktualan socion ol la tiutempan.

Pro la erara - kaj ankaŭ intence erariga - asociigo de la marksaj analizoj kaj konkludoj kun certaj ŝtataj konkretiĝoj kiuj havas nur malmultan aŭ nemonon por fari kun Markso krom la pretendon - ekzemple la stalinisma sistemo -, iuj identigas ties disfalon kun historia senvalidigo de la marksismo. Tamen la ĉiutaga sperto montras, male, la validecon kaj aktualecon de la marksaj verkoj. Pro tiu konfuzo multaj scioj intertempe perdiĝis, kaj la alternativa movado iom post iom provas reinventi la radon...

Sed ne necesas reinventi la radon. Ekzistas valora - kaj praktike uzebla - teoria fundamento por kompreni la bazon de nia socio kaj taŭge agi en ĝi. Kompreneble, por pli detale studi la fundamentojn de la politika ekonomio, konsilindus legi - kaj prefere tralabori en studgrupoj - la trivoluman ĉefverkon de Karlo Markso, *La Kapitalo*. Tie detale pristudeblas ekzemple, kiel la *leĝo de la tendenca falo de la profitkvoto* puŝos la grandajn kapitalismajn entreprenojn serĉi ĉiarimede profitojn ekster la "normala" ekonomia funkciado de la kapitalo.

Sed por kompreni la funkciadon de nia ekonomio, kaj por iom orientiĝi en la ekonomiaj bataloj de niaj aktualaj socioj, estas ege konsilinde legi tiun ĉi relative mallongan tekston, kiu estiĝis kiel vigla argumentado kontraŭ certaj tezoj parte ankoraŭ hodiaŭ disvastiĝintaj.

Vilhelmo Lutermano, Pedro Betancourt, la 20-an de oktobro 2007

Presita en Germanio êe Digitaldruck Leibi, Neu-Ulm, en novembro 2007

ISBN: 978-2-9529537-1-9

EAN: 9782952953719